

### SPECIAL NOTICE.

The attention of all our readers is especially called to our new address. When the new management took charge on January first the American Esperantist Company was quartered in rooms adjoining the office of the Association, but even at the first this was found too crowded. Since that time business has increased until we realized that when the fall rush came we would be seriously handicapped. An opportunity presented itself suddenly to secure excellent quarters, and hence the unannounced change. As we were moving just after the mailing of the last magazine, any delays in filling orders about that time may be attributed to this.

New address is 2404 Fourteenth Street, N. W., Washington, D. C., but letters may be addressed simply Washington, D. C.

### SPECIALA AVIZO.

Ĉiuj bonvole rimarku ke ni nun havas alian novan adreson. Kiam la nova direkcio komencis, je la unua de januaro, administri la "American Esperantist Company," ĝi estis en ĉambroj apud la oficejo de la asocio, sed eĉ tiam estis apenaŭ sufiĉe da spaco. De tiam la aferoj de la kompanio kreskas, ĝis ni komprenis ke ni devas havi pli grandan oficejon. Tial, kiam ni subite trovis bonan konstruaĵon, ni tuj luis ĝin por la kompanio kaj ĵurnalo. Post kiam ni aranĝos ĝin, ni havos tre bonan kaj sufiĉe grandan lokon por niaj aferoj, kaj invitas ĉiun viziti nin.

Nova adreso estas 2404 Fourteenth Street, N. W., Washington, D. C., sed leteroj adresitaj nur Washington, D. C., bone alvenas ĉe ni.

## ANNOUNCEMENTS

At this season many of the Esperanto societies and classes declare a recess after a year of good work for the cause. In most cases the members individually continue their study and reading, often reading more during the vacation season, as we note from our book sales and letters of comment on the issues of the magazine. But many, no longer "touching elbows" with the other soldiers of this great international army of peace, cease their endeavors to secure new recruits. Yet no time of the year is better. Almost every man and woman will stop and chat during these lovely summer days. Every one is a prospect for Esperanto. Most of the world's inhabitants are only waiting to be told about our aims. They already believe in the essence of Esperantism. Tell them! Ask them for \$1.00, and send their subscription to *Amerika Esperantisto*. By return mail they will receive the

premium paper-covered text-book, and if they are rational human beings, they will be Esperantists before the year has ended.

Did you make your extra copies of the May Number pay? Did you use them effectively and secure new recruits for Esperanto? We sold you four thousand copies at half price, but we have not yet received one-half of four thousand subscriptions or orders for text-books. Suppose you "follow up" the copies you gave away, and see that they bear fruit!

And, if any of you still want copies of the May Number at half price, send in your orders at once, for we have only a few hundred left.

The Congress Number (October) we expect to make the best ever published. It will tell less of what Esperanto is, but will be filled with facts of what Esperanto does. Interesting articles describing the meetings of the Seventh International

Congress in Antwerp, short stories of the practical use of Esperanto in the travels of Americans through Europe and of the fraternity engendered by Esperantism, with photographs of meetings and groups of delegates from all corners of the globe, will go to make up a most convincing set of arguments for Esperanto. You need send no money until September (although naturally we shall not refuse to be your banker meantime), but write us as soon as possible how many you will want if the rate of five cents each (in bundles of five or more) is given again. Even though October seems now far in the future, we must be able soon to reckon the size of the edition, since all orders for paper and printing must be given before we leave for

Antwerp. Most of the articles will be written "on the spot" or on the steamer returning, while impressions are still most vivid.

We wish to make the Congress Number a gem, not alone in literary content, but in appearance also. For the cover we wish an attractive design, and for this purpose hereby offer a prize of Five Dollars (\$5.00) for the design which is, according to our judgment, the best for this purpose. Naturally we reserve the right to reject any or all designs offered. We will gladly furnish more definite ideas of our desires to any wishing to compete. All designs, to be considered, must be received before the fifteenth of July.

---

## FOREIGN NEWS

---

**France.**—The Railway Company of Orleans is preparing a booklet in Esperanto describing its railway and giving various other information. To have prevailed upon this important company to make use of Esperanto is an important step leading to the use of the language by all of the railways of this country.

In Toulon twenty-seven firms have decided to use Esperanto in business relations. Inasmuch as all of these came to such a decision within one week, we may look for still more interesting results of the propaganda work of the energetic local esperantists. One of the more prominent firms has the following inscription on its letter heads (in French): "We request our foreign correspondents to write us in French, or, failing that, in Esperanto."

The annual meeting of the Esperantist Federation of Normandy will take place in Rouen July 2nd. An attractive "Gvidlibro en Rouen" is being prepared, with plentiful illustrations. It may be had for 0.25 Sm. by addressing the magazine "Normanda Stelo" (41 rue de la Vicomte, Rouen).

The recent convention of the "Societo Franca por la Propagando de Esperanto," in Lyon, was a complete success in every

way. New statutes, leading to a more satisfactory union of all French esperantists, were adopted by a vote of 6,000 (as against 400 voting negatively and 1,000 not voting at all).

One of the most interesting new organizations in Paris is that projected among the non-French esperantists in the city, for the twofold purpose of serving these many foreigners, and of demonstrating to any sceptical Parisians the actual utility of the international language. The secretary of the preliminary organization is a Turk, and doubtless a surprising number of different nationalities will ultimately be represented.

Among the various enjoyable meetings and attractive programs to be noted in the different sections of Paris may be mentioned one of the monthly banquets, attended by a number of prominent guests, mostly government officials; also a celebration in honor of the students in the various courses, who have now completed the work outlined, was another pleasant feature.

**Belgium.**—The third congress under the auspices of the Belgian Esperanto League, to occur during June in Charleroi, should prove a very satisfactory affair, judging from the preliminary program announced,



and the preparations being made. The mayor of the city will give the official welcome, and an exposition of esperantist literature, etc., will aid in the propaganda work planned. This convention is of especial importance, since the Belgian esperantists have in charge the preparation for the coming International Congress (further mention of which will be found elsewhere in our columns).

**Germany.**—The number of groups, classes, and also of students completing courses is a gratifying indication of the sure and steady progress of Esperanto in Germany; and the number of articles on the subject and in Esperanto mentioned under the headings show that the press recognize the interest taken in the language by the public, and are supplying the information demanded. A significant item is also to be found in a statistical report, which, after citing a goodly list of regions represented by clubs, ends by a very small list of localities in which as yet no clubs exist.

**Denmark.**—A special plea that at least one member of the Esperanto societies in as many countries as possible subscribe for "Dana Esperantisto" is made in the April issue of this magazine, which is doing good propaganda work under greater difficulties than are met with in many regions. The address is Bredgade 35, Copenhagen (subscription price 2 Sm. per year).

**Warsaw.**—The regular meetings of the

local society are well attended and thoroughly enjoyable. The frequent presence of Dr. Zamenhof himself and of Mrs. Zamenhof is an added pleasure which this group enjoys over those of other countries.

**Cracow.**—The local esperantists have already elected an energetic committee, which is making preliminary plans for the preparation of the Eighth International Esperanto Congress, which they intend formally to invite when the proper time comes for decision of that matter during the Seventh Congress in Antwerp next August. The mayor of the city has already promised that both the Old Theatre and the New Theatre will be available, also that financial support and other active assistance will be forthcoming from the city authorities.

**Bucharest.**—The Rumanian Esperanto Society has had printed posters to announce the opening of two public Esperanto courses, and placed these throughout the city. Good results are expected.

**Belgrade.**—The "Serba Esperantisto," printed partly in Esperanto, partly in Serbian, has now reached its fourth number, under the auspices of the Servian Esperanto Society.

**Santiago de Chili.**—The magazine "Esperanto Penso" increases even with the second issue. Dr. Estanislao Fraga, president of the Chili Esperanto Association, has shown his interest in the new magazine by substantial assistance.

---

### THE ESPERANTO STAR.

---

We hang our hopes upon thy points,  
O Esperanto star!  
Of brotherhood and world-wide peace  
Thou art the avatar:  
The nations see thy rising light,  
And welcome thee afar.

The world is waking to the might,  
Thy wondrous potency,  
To bind the nations of the earth  
In bonds of amity:  
The dream, "My country is the world"  
Evolves to verity.

Now peace on earth, good will to men,  
The world may win through thee!  
Be thou the symbol to mankind  
Of truest liberty:  
Then shine, O star, both near and far  
The world has need of thee!

S. V. K.

## KRONIKO NORDAMERIKA

[Ni petas la konsilantojn, la distriktajn kaj precipe la lokajn sekretariojn, ke ili sendu plenajn raportojn pri la progreso de la Esperantista Movado en siaj urbej, distriktoj kaj apartaĵoj, antaŭ la mezo de ĉiu monato. Ni ankaŭ petas la individuojn, ke ili ankaŭ sendu, antaŭ la mezo de ĉiu monato, raportojn pri artikoloj en ĵurnaloj, paroladoj, intervjuoj, kaj pri ekstarigo de klasoj, ĉar la raportoj en "Kroniko Nordamerika" estos plej precizaj se la informo pri ĉio venas rekte de la koncernata loko.]

**Portland, Me.**—Ekzistis granda entuziasmo pri Esperanto dum la tuta sezono. La societo estas pli multnombra ol iam antaŭe. Ĉiusemajne kunvenas kvin diversgradaj grupoj (tri el ili uzas la "Complete Grammar" de Kellerman), krom kelkaj individuaj lernantoj. Sro. Harris faris tre interesan kaj sukcesan eksperimenton, instruante klason da geknaboj dekdu dek kvinjaraj. Volonte ili kunsidis ĉe li, dufoje en semajno, post kvin horoj en la lernejo, kaj ŝajnis ĝui la studadon. Ili nun konas pli multe ol duono de la "Fifty Lessons" de Privat, kaj kelkaj el ili korespondas kun fremdaj junuloj. Du lokaj ĵurnaloj, la "Portland Evening Express and Advertiser," kaj la "Daily Eastern Argus," donis bonegan fotografe ilustritan raporton pri la geknaba klaso. Ĝiaj anoj estis elektitaj el la Butler, Clifford kaj Emerson lernejoj, de la lernejestroj, por fari eksperimenton. Oni intencas noti la progreson de ĉi tiuj geknaboj en la lernejoj la venontan jaron, por konstati ĉu ili efektive pli facile lernos la francan, latinan, aŭ aliajn lingvojn ol la aliaj lernantoj, kiuj ne havis la bonan enkondukon al fremdaj lingvoj donitan per studado de Esperanto.

**Manchester, N. H.**—Du agemaj societoj ekzistas ĉi tie. Unu estas la Pionira Grupo, kiu kunvenas la unuan lundon vespere ĉiusemajne, kaj kies oficistoj estas la jenaj: prezidanto, Fino. Daisy E. Flanders; vicprezidanto, Sino. Ethel Kellogg; sekretario-kasistino, Fino. Lois Beck; libraristo, Fino. Maude Abbott.

La alia societo estas "La Vigla Grupo," kiu kunvenas ĉiulunde, posttagmeze. La prezidanto estas Sino. E. J. Burnham; vicprezidanto, Sino. Lisa Rogers; sekretario-kasistino, Sino. Bessie Marston; libraristo, Sino. Minnie Prime.

**Mt. Sunapee, N. H.**—La lernestro en la apudurbo Goshen' ĵus anoncis ke li baldaŭ komencigos kurson esperantan en la lernejo. Ĉi tiu estas eble la unua "kampara lernejo" en Usono, kiu havos oficialan kurson de la internacia lingvo. Kvankam la urbeto estas malgranda, ĝi estas somerloĝejo de multaj riĉuloj, tial ĝi estas bone konata en Nov-Anglujo. La lernejestro, Sro. Milton A. LaFontaine, estas progresema instruisto, kaj sendube atingos bonan rezultaton de sia eksperimento. La estro de la loka Estraro pri Instruado, Sro. Walter R. Nelson, estas simile energia kaj progresema, kaj rilate al la lecionoj esperantaj esprimis la deziron havi en la lernejo skribmaŝinon portantan la esperantajn literojn. Tuj kiam ŝi aŭdis pri tio, Fino. Geraldine Bowman, kiu interesiĝas je la afero, proponis provizi la lernejon per tia skribmaŝino. Tial oni povos je la komenco uzi esperantan skribmaŝinon. Ĉiuj lernantoj ĝojas pri la enkonduko de la lingvo, ĉar kelkaj el ili jam private studis ĝin, kaj eĉ komencis interŝanĝi poŝtkartojn kun eŭropaj samideanoj.

**Montpelier, Vt.**—La "Washington County" Esperanto Societo, kies prezidanto estas Majoro F. B. Thomas; vicprezidanto, Sro. H. H. Hartwell, kaj sekretario, Sro. John L. Stanyan, kunvenas ĉiuvendrede, je 7:30. Bona progreso kaj daŭra entuziasmo estas tute konstatebla.

**Boston, Mass.**—La loka societo ĝuis tre agrablan kunvenon, la 11an de aprilo, kun interesplena programo. Nome, oni festis la nasktagon de Dro. D. O. S. Lowell, prezidanto de la societo, kaj bonekonata esperantisto, kiu tute ne sciis ke oni intencis aranĝi tian feston, kaj estis multe kaj agrable surprizata je la tuta afero. Je la nomo de la societo, Sro. John Fogg Twombly, unu el la pioniroj de Esperanto



en Usono, prezentis al Dro. Lowell grandan kvanton da belaj rozoj, samtempe esprimante al li la resplekplenan saluton de la societo. Post tiu prezentado, Dro. F. H. Loud legis ĉarman originalan poemon, dediĉitan al Dro. Lowell. La programo finiĝis per kantado de Fino. Duff, legadoj de Sro. Harrison kaj Small kaj Dino. Stone, parolado de Sro. Amster, kaj deklamado de la sesjara filo de Sro. Downs, kiu sendube estas la plej juna esperantisto en Bostono.

La Bostono societo, kiu jam havas pli ol cent anojn, eldonis presitan programon de la kunvenoj, klasoj, promenoj esperantaj, k. t. p., aranĝitaj por la monato aprilo. La societa ĉambro (209 Pierce Bldg.) estas ĉiutage (escepte dimanĉe) malfermata por akcepti vizitantojn kaj anojn, kaj vendi librojn, k. t. p., de 3-6, ankaŭ vespere antaŭ la kunvenoj. Oni vizitu aŭ telefonu (B. B. 1788-J) en tiu tempo.

**Providence, R. I.**—La lokaj esperantistoj kunvenas ĉiulunde vespere ĉe Sro. Henry S. Reynolds, kiu plenumas la sekretariajn devojn, kvankam ĝis nun oni ne formale organizis societon.

**New Haven, Conn.**—Antaŭ nelonge, precipe per la klopodoj de sinjoreto Jozefo Lepsey, kredeble la plej juna esperantisto en la urbo, oni fondis novan klubon, la "Zamenhofa Rondo de Junaj Esperantistoj," kiu kunvenas ĉiuĵaŭde ĉe la kunvenejo de la "New Haven Esperanto Club." Oni elektis la jenajn oficistojn de la klubo, kiu plimultigas ĉiusemajne: prezidanto, Mabel DeScheen; vicprezidanto, Frederick Knodel; sekretario, Josefo Lepsey; financa sekretario, Josefo DeScheen; konsilanto kaj kasisto, George W. Wilber.

La "New Haven Esperanto Club" kunvenas ĉiumarde, ĉe 107 Bradley St. La prezidanto estas Sro. Geo. E. Stansfield; vicprezidanto, Geo. W. Wilber; sekretario, Hubert A. Welch; financa sekretario, Anton Frank; kasisto, Frank X. Kurtz, libraristo, Joseph Lepsey.

**Switzer, Ky.**—La "Gejunula Ligo," nova klubo kies oficistoj estis nomata en la aprila numero, kunvenas ĉiuĵaŭde ĉe Pro. E. R. Jones, kaj bone progresas en sia studado de la lingvo.

**Baltimore, Md.**—Pastro Paul F. Hoffman estas prezidanto, kaj Fino. Henriette Wingate estas sekretario, de la loka societo, kiu multe laboras por propagandi la karan lingvon.

**Annapolis, Md.**—La ĵurnalo "Evening Capitol," reprenis (tradukitan) artikolon el *Amerika Esperantisto*, donante al ĝi tutan kolonon sur la antaŭa paĝo, pro la influo de la loka klubo, kies oficistoj estas la jenaj: prezidanto, Pro. George B. Pfeiffer; vicprezidanto, Pastro J. L. Smiley; sekretario-kasistino, Sino. Robert Moss. La klubo kunvenas dufoje en ĉiu monato.

**Washington, D. C.**—Tri societoj, krom diversaj grupoj kaj klasoj, daŭras energie sian studadon kaj propagandon. La Gejunula Klubo, kiu estas la plej nova, antaŭ nelonge prezentis la komedieton "Ĝis la Revido," je unu el siaj kunvenoj, kaj jam preparas la prezentadon de alia komedieto. Dume, ĉiuj anoj energie studas la lingvon, kaj jam komencas bone paroli.

**Perth Amboy.**—Antaŭ nelonge aperis en la "Evening News" bone redaktita resumo pri Esperanto en la lernejoj. Ĉiu, kiu volas scii pri la progreso de internacilingvaj aferoj en Perth Amboy ja devus aboni tiun ĵurnalon.

**Tryon, N. C.**—Traduko de artikolo el *Amerika Esperantisto*, kune kun favora mencio pri Esperanto, estas enpresita en la ĵurnalo "Tryon Bee," pro la influo de Dro. H. J. Garrigues.

**Christina, Fla.**—Sro. M. Legros, franca esperantisto kiu dum kelkaj monatoj loĝis en ĉi tiu urbo, nun revenas Parizon. Survoje li vizitis Charleston, Washington, Baltimore, Philadelphia kaj Nov-Jorko, kaj ĉie la lokaj esperantistoj lin renkontis ĉe la vagonaro, kaj faris sian eblon por fari agrabla lian viziton, samtempe ĝuante la okazon konatiĝi kun fremda samideano, kiun ili trovis tre simpatia amiko.

**Cleveland, O.**—La oficistoj de la loka societo estas: prezidanto, Sro. H. S. Hall; vicprezidanto, Sino. F. E. Kimball; kasisto, Sro. Oswald Coleman; sekretariino, Fino. Sybil E. Bailey, 5911 Scovill Ave. Ĉiu loka aŭ vizitanta esperantisto devus interrilati kun ĉi tiu agema klubo.

**Detroit, Mich.**—Esperanto havas bonan historion en ĉi tiu urbo. La unua societo, fondita en 1908 de Dro. H. W. Yemans ŝanĝis sian nomon kaj estis reorganizata la 1an de oktobro kiel la "Detroit Esperanto Society." Ĝia prezidanto estas Dro. H. W. Yemans; unua vicprezidanto, Fino. Margaret Mears; dua vicprezidanto, Sro. Louis Steiner; sekretario-kasisto, Dro. Tobias Sigel.

Alia agema societo esperantista en Detroit estas la Germano-Usonana Unuiĝo, kies anoj (germano-usonanoj) pagas jaran kotizaĵon de 12 Sm. por subteni la propagandon aranĝitan de tiu societo.

Troviĝas nun en Detroit kvin "stacioj" kie Esperanto estas senpage instruata. Plie, *Amerika Esperantisto*, kune kun ekzemplero de la "American Esperanto Book," estas trovebla en dek urbaj bibliotekoj.

**Sault St. Marie, Mich.**—Dro. H. W. Yemans, vicprezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, donis paroladon ĉe la Y. M. C. A. (junula kristana ligo), ankaŭ ĉe la Virina Klubo, klarigante pri la lingvo Esperanto, ĝia historio, kaj la nuna stato de la esperantista movado, al tre interesataj aŭdantaroj. En Marquette li ankaŭ donis kelkan tempon al propagando, kvankam li ne restis sufiĉe longtempe por ke oni aranĝu paroladon.

**Chicago, Ill.**—La anoj de la Gradata Esperanta Klubo, kies prezidanto estas Dro. Simonek, kaj iliaj amikoj aranĝis malgrandan ekspozicion de esperantaj libroj, ĵurnaloj, gazetoj, poŝtkartoj, k. t. p., en la "Field House" (kampa domo) de Okcidenta Parko Nro. 3, kiu estas proksima de bohema kvartalo en ĉi tiu granda urbo. Kvar grandaj tabloj estis kovritaj de esperantaj libroj kaj ĵurnaloj, inter kiuj troviĝis la plimulto de la verkoj de Zamenhof, Kabe, kaj aliaj, kaj la plej gravaj vortaroj, k. t. p., kune kun gazetoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tio, kio altiris plej multe la atenton de vizitantoj estis la ilustritaj poŝtkartoj, ricevataj per esperantista korespondado kun multaj diversaj landoj. Ses vicoj da kartoj kovris la murojn de tri muroj de la ĉambro, kaj ĉia speco de karto estis trovebla inter la granda kolekto. La ekspozicio daŭris tri tagojn, kaj de tempo al tempo oni faris pa-

roladojn en la bohema aŭ la angla lingvo, klarigantajn pri Esperanto al la vizitantoj. Malgraŭ tre malagraba vetero, oni ĉeestis grandnombre, kaj bona propagando estis plenumata. Detaloj pri novaj klasoj, unu el kiuj enhavas 71 anojn, estos baldaŭ ricevataj. Ni gratulas ĉi tiun energian klubon pri la bonega propagando kiun ĝiaj oficistoj kaj anoj faras pro la internacia lingvo!

**Elgin, Ill.**—La loka societo kunvenas la duan mardon ĉiumonate, kaj je venonta kunveno prezentos la komedieton "Ĝis la Revido." La prezidanto de la societo estas Sro. J. J. Burita; vicprezidanto, Sino. A. Andres, sekretario-kasistino; Fino. Elsie I. Schultz; kvara ano de aga komitato, Sino. Emma Wager. La honora prezidanto estas Dr. Clara L. Todson.

**Milwaukee, Wis.**—La societo "Hesperus" kunvenas ĉiuvendrede, ĉe Fino. E. M. Tobey, 632 Summit Ave., por interparolado kaj studado. Sino. Belle H. Kerner estas sekretariino.

**St. Louis, Mo.**—Ĉiudimanĉe kunvenas nova klubo en la Christian Brothers College. La ĵus elektitaj oficistoj estas: prezidanto, Sro. Mariano Mojado; vicprezidanto, Fino. Heleno McCarthy; sekretario, Sro. Armando Cabrera; kasisto, Sro. Stojan T. Ketipoff. La klubo estas tre entuziasma, kaj energie laboras por perfektigi ĉiujn siajn anojn en la lingvo internacia.

**Lewis, Kansas.**—La esperantista movado bone progresas ĉi tie, pro la klopodoj de Dro. E. E. Haynes, konsilanto de la sudokcidenta apartaĵo, helpata de Sro. Ed. Chalk kaj aliaj oficistoj kaj anoj de la Asocio. Kvar klasoj nun studas la "Complete Grammar of Esperanto," nome, klaso da junuloj el la supra lernejo, klaso de geknaboj, instruataj de Jas. Wolfe, ano el la supralerneja klaso, klaso da sinjoroj, plejparte aferistoj, kaj komenconta klaso da fraŭlinoj. Ĉiu esperas ke Esperanto estos oficiale enkondukata en la lernejojn, la venontan aŭtunon, kaj unu el la instruistoj en la lernejoj jam sin preparas por esti tute preta instrui la lingvon, ĉar ĝia enkonduko kredeble okazos. La lokaj ĵurnaloj presigas tute favorajn artikolojn pri Esperanto.



**Iola, Kansas.**—Ĉi tie klaso de sinjorinoj estas instruata de Sino. Cora G. Waggoner, kiu entuziasmigis ilin per sia interesa raporto pri la Sesa Internacia Kongreso, kiun ŝi ĉeestis la pasintan aŭguston en Washington.

**Kinsley, Kansas.**—Ĵus fondiĝis malgranda esperantista grupo, kiu espereble pligrandiĝos, kaj bone prosperos.

**Stafford, Kansas.**—Oni klopodas por starigi esperantistan grupon en ĉi tiu urbo. Ĉiu, kiu estas interesata kaj volas helpi la aferon, bonvole skribu pri tio al la lokaj ĵurnaloj, aŭ komuniku rekte kun la ŝtata sekretario, Sro. Ed. Chalk, Lewis, Kansas.

**Telluride, Colo.**—Esperanta grupo kredeble baldaŭ estos starigita ĉi tie. Bona komenco estas montrita per samtempa mendo por sep ekzemplerojn de la "American Esperanto Book." Ni esperas doni pli longan raporton estonte.

**Everett, Wash.**—La studado de Esperanto daŭras senlace, inter la klasoj instruataj de Sro. F. P. Zent.

**Tacoma, Wash.**—La loka societo, kies prezidanto estas Sro. C. E. Donelson, kaj sekretario-kasistino Fino. Amy Siddall, kunvenas ĉiuŝaŭde je la oka, en ĉambro 208, Lucerne Bldg., S. 9th kaj Tacoma Avenuoj. La sekretaria adreso estas 3708 S. Asotin Ave.

**Wells, Ore.**—La loka grupo kunvenas ĉiulunde vespere, en la publika lernejo. La oficistoj estas: prezidanto, Sro. J. E. Davis; vicprezidanto, Sro. A. A. Williamson; sekretario-kasistino, Fino. Zella Dodele. La nomo de la grupo estas "Wells Esperanto Club."

**Los Angeles, Cal.**—La lokaj esperantistoj, kaj la tuta urbo, multe interesigas je tre interesa reklamado, kiun la komerca ĉambro de la urbo ĵus entreprenis. Ili provizis Sron. D. E. Parrish, kiu estas entuziasma kaj sperta esperantisto, je bona lumbildmaŝino kaj kelkcentoj da kliŝoj, por ke Sro. Parrish povu doni paroladojn pri tiu parto de la ŝtato Kalifornio, samtempe montrante la belajn bildojn de la urbo kaj la ĉirkaŭa regiono. Sro. Parrish donos esperantajn paroladojn, en preskaŭ ĉiu granda urbo de Eŭropo. La esperantistoj en la diversaj eŭropaj urboj jam aranĝas por la paroladoj, kaj por la gastigado de ĉi tiu usona samideano. Jen bona pruvo pri la progresemo de Los Angeles, kaj ankaŭ bona estonta pruvo pri la granda taŭgeco de Esperanto! Kiam Sro. Parrish revenos de Eŭropo, post proksimume jaro, li povos ja doni interesegajn paroladojn pri siaj travivaĵoj kaj pri la sukceso de la entrepreno.

**Pasadena, Calif.**—La lokaj esperantistoj antaŭ nelonge ĝuis la vidadon de la multaj belaj kliŝoj, kiujn Sro. Parrish uzos en sia ĵus komencota esperanta vojaĝado tra Eŭropo. Li montris ilin per la bonega lumbildmaŝino kiun li uzos dum siaj paroladoj en Eŭropo, sur la blankaj surjetante koloritajn bildojn de Pasadena, Los Angeles, San Diego, San Francisco, Redlands, Riverside, k. t. p. La reklama vojaĝo pro ĉi tiu regiono, kiun Sro. Parrish faros per la helpo de la ĵus cititaj urboj, estos bonega propagandilo por Esperanto, kiel ankaŭ pro tiuj partoj de la ŝtato, kaj ni esperas ke la komercaj ĉambroj de la urboj, kiuj estas tiel progresemaj, estos tute kontentaj je la rezultatoj de sia laŭdinda entrepreno.

### ALDONO AL LA KRONIKO

La jenaj raportoj estas ricevataj de post la presado de la supre raportitaj novaĵoj (kiuj estis preparitaj por la maja eldono de Amerika Esperantisto sed ellasitaj pro manko da spaco).

**Portland, Me.**—La societo ĵus elektis siajn oficistojn por la venonta jaro, nome: Prezidanto, Dana W. Fellows, M. D.;

vicprezidanto, Charles W. Foster; sekretario kaj kasisto, Herbert Harris; ceteraj direktoroj, William E. Perkins, Fino. M. Alice Robbins, Fino. Kate W. Whitney. La ĵus finiĝinta sezono estis la plej sukcesplena en la historio de la societo. Estas sepdek sep anoj en la societo, kiu kondukis kvar kursojn por studado. La so-

cieto elektis Dro. Fellows, Sro. Harris kaj Sino. Elbra B. Carr delegitoj al la internacia Kongreso en Antwerp.

**Barre, N. H.**—Ĉar oni parolas diversajn lingvojn ĉi tie, oni decidis starigi Esperantan klason en la Socialista Klubo, por ke post kelka tempo la anoj povu uzi unu solan lingvon en la kunvenoj. Sro. Stanyan el Montpellier donis paroladon pri la lingvo, kaj oni elektis komitaton por fari aranĝon por la klaso.

**Boston, Mass.**—La Bostona Ĉambro Komerca, kiu estas aranĝanta vojaĝon en Eŭropon por proksimume cent delegitoj, ricevas leterojn de esperantistaj societaj, kiuj afable proponas sian helpon al la delegitoj. Leteroj jam venis el Munich, Frankfort, Cologne, Dresden, Nuremberg, kaj aliaj. La dato de la ekiro el Bostono estas la 12a de junio.

**Cleveland, Ohio.**—18an de majo, la societo aranĝis tre sukcesplenan kunvenon, por festi la finon de tre kontentiga jaro da propagando en ĉi tiu urbo. Sroj. H. S. Hall kaj E. Karpowsky donis mallongajn paroladojn, kaj konversacio sekvis. La klasoj ne kunvenos dum la somero, sed la societo daŭrigos siajn kunvenojn.

**Chicago, Ill.**—La 26an de marto oni aranĝis vesperon pol-esperantan, kun paroladoj, kantoj, deklamadoj, k. t. p., por propagandi nian lingvon inter la ĉi tieaj popoloj. Ĉirkaŭ 150 personoj ĉeestis, kaj la interesiĝo pri nia afero estis kontentiga. Naŭdek homoj subskribis la deklaron pri intenco lerni Esperanton, kaj fondi societon sub la nomo "Rondo de Polaj Esperantistoj." La kurso sekvis, kun

ĉirkaŭ 30 lernantoj. La lecionoj okazas ĉiudimanche de 2-6a posttagmeze. La 14an de majo nia provizora komitato aranĝis la duan vesperon, kune kun la elekto de la estraro de R. P. E. Du polaj virĥoroj kantis polajn kaj esperantajjn kantojn. Elokventan paroladon pri utileco de Esperanto faris pastro Pawlikowski; la poemon "La Vojo;" deklamis la instruisto de R. P. E., Sro. J. Wiczorkiewicz; kaj la poemon "Kanto de l'Ligo" lia 14-jara filino Paulina. Pli ol 300 personoj ĉeestis. Post la muzika parto de la programo oni alpaŝis al la elekto de estraro. La jenaj estas elektitaj: Prezidanto, Sro. W. Tabenski; vicprezidanto, Sino. K. Michotek; sekretario, Sro. J. Wiczorkiewicz; kasisto, Fino. S. Filipkowska; bibliotekisto, Sro. W. Fordonski; membroj de la amuzaja fako, Sro. Wactawinek, Sro. Lekan, kaj Fino. Gintner.

**Detroit, Mich.**—La 14an de majo, la Germana-Usonana Esperanto Unuiĝo festis la templimon de la kurso esperanto, per festo ĉe la hotelo Randolfa, kun bona manĝo, kies menuoj estas esperante presitaj, paroladoj kaj muziko. Kvankam la kursoj ĉesis dum la somero, la anoj de ĉi tiu energia klubo senĉese propagandas kaj studas la internacian lingvon.

**Grants Pass, Ore.**—La ĵurnalo "Daily Rogue River Courier," antaŭ ne longe presigis bonan raporton pri Esperanto kaj la loka grupo.

**Rico, Colo.**—La ĵurnalo "The Rico Item" komencis sian redaktoran kolonon antaŭ nelonge per artiloketo favora al Esperanto.

### REMEMORO PRI MATANZAS

La urbo Matanzas, en Cuba, sidas sur la bordo de la bela golfeto havanta la saman nomon. La formo de la arkitekturo, la gajaj koloroj de la domoj, la parkoj kun siaj tropikaj floroj kaj foliaĵo, faras ĝin, speciale en Decembro, plej alloga al la okuloj de homoj, kiuj ĝis tiam konis nur la nudajn arbojn kaj malvarmecon de la norda vintro.

Antaŭ ol mi diris adiaŭ al la urbo, mi supreniris je sunsubiro al la tegmento de preĝejo, kiu staras sur la supro de monteto; kaj la vidaĵo, kiun mi vidis de tie, estis tia kian mi neniam forgesos. Je

unu flanko, mi rigardis ebenajon de la plej ĉarmega verdaĵo. Ĝi estas la Yumuri valo, nomata la plej fruktoporta valo en la mondo. Je la alia flanko estas la urbo kun la golfeto en la malproksimo.

Ŝajnas al mi ke mi neniam vidis pli gloran sunsubiron; kaj ĝia rebrilo en la akvo de la golfeto, kune kun la bluaj, flavaj, rozruĝaj kaj aliaj helaj koloroj de la domoj, faris tian bildon, kian mi ne havas la vortojn por priskribi. Ĝi estis pli bela ol la plej bela pentraĵo, kiun iu ajn pentristo iam pentris.

Delia C. Condron.



# OFFICIAL COMMUNICATIONS

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA.

THE ESPERANTO OFFICE, WASHINGTON, D. C.

Edwin C. Reed, Sec.-Treas.

## NEW ADDRESS.

Since the American Esperantist Company has offered to give **The Esperanto Association of North America** for the balance of the association year such room as it needs in the building which the company has rented, and makes no charge whatever to the Association for this, the office of the Secretary-Treasurer has been transferred to 2404 Fourteenth Street, N. W., Washington, D. C.

## ANNUAL MEETING.

As announced in the May number of **Amerika Esperantisto**, the North American Congress will not occur in Portland, Oregon, this summer. The invitation was withdrawn after ascertaining that few of the Esperantists outside of Oregon and Washington would be able to attend.

Between the time of going to press and the appearance of the May number the matter was referred to the General Council, with request that some resolution or resolutions on the matter be proposed for action. Councilors Fessenden, Hall, Smiley and King proposed almost identical resolutions to the effect that, as it was now too late to undertake any sort of congress, a business meeting of **The Esperanto Association of North America** be held in New York City, without any special attempt at the usual entertainments, etc. This resolution was placed before the General Council for action, and by the time of going to press a majority of the Council had voted favorably. The meeting will be held August second, and will continue, if it is found necessary, during August third and fourth.

Since New York is about the most accessible point for nine-tenths of the Esperantists of the country, and since in addition it is the sailing point for thirty or more Americans who leave for the International Esperanto Congress on the fifth, it would seem as though this meet-

ing ought to have the attendance of a very large proportion of those actively interested.

Inasmuch as the time between the appearance of the May number, which was late, and the time of going to press with this June **Amerika Esperantisto** was so short, no nominations for Councilors nor matters proposed for action at the meeting have been received. Since the constitution requires that such proposals shall be published in this magazine or mailed to each member at least thirty days before the meeting, and since the next number will not be published until the tenth of July, it has been suggested that the June "**Esperanto Herald**," published the last few days of June, contain such matters. Therefore any amendments and any nominations for the various councilor positions should be sent to the General Secretary at once.

**COME TO NEW YORK!**

**AUGUST SECOND!**

## NEW ENGLAND ESPERANTO ASSOCIATION

Plans are being made for a general meeting of the association in Boston, June 16th and 17th.

There will be a business meeting and entertainment on the evening of June 16, and on the 17th it is proposed to make a trip by special trolley to a bungalow on the beautiful Canton Lake, where the major portion of the day will be given up to recreation, conversation and consideration of any unfinished business.

Those who may arrive in Boston during the middle of the day on the 16th will find the Esperanto headquarters at Pierce Building, Copley Square, where a number of the Boston Society will be found.

As soon as complete arrangements are made due notice of the full program will be forwarded to secretaries of all societies and to individual members.

The summer meetings of the associa-

tion during past years have been most enjoyable, and it is hoped that the members will make a special effort to make this the biggest and best yet.

C. H. Fessenden,  
District Secretary.

#### ESPERANTO HERALD NO. 7.

The May number of the *Esperanto Herald*, published by the Esperanto Association of North America in an endeavor to provide a series of pamphlets, each of which will be unique for propaganda in some special field, has the title "Esperanto and its Value to the Physician." This shows how Esperanto can be, and in fact already is, of especial value to medical men, whose work is such that they not only come in contact with persons who speak numerous and varied languages, but need to read and study technical publications written by their colleagues of many different nationalities; and who would find the international language also of great benefit in the increasingly frequent and important medical congresses, at which Esperanto is already beginning to be tested with notable success.

#### NEW APPOINTMENT.

On nomination by Mr. J. M. Geldert, Councilor of the Canadian Division, Mr. Morton Rayner, of Ituna, Saskatchewan, has been appointed Assistant Councilor for Saskatchewan. All esperantists in that province are requested to put themselves in communication with Mr. Rayner as soon as possible.

#### INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Antaŭ kelkaj monatoj, Sro. Eittinger, inĝeniero el Rusujo, publikigis alvokon al la esperantistaj inĝenieroj, celante stariĝi Internacian Asocion de Inĝenieroj, kaj Sro. Stromboli, el Genova, prenis sur sin la organizadon de tiu grava asocio, tuj poste, li ricevis sufiĉe grandan nombron da aliĝoj, kio pruvas ke la ideo de Sro. Eittinger estas trafa kaj havas grandajn ŝancojn sukcesi.

Samtempe la Scienca Asocio intencis alporti al sia organizado, gravan aldono ebligantan la formadon, inter siaj

#### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION

##### Atesto pri Lernado.

Mr. F. N. Mann, Bliss, Okla.  
Miss Frances Davies, Indianapolis, Ind.  
Miss Mary Parker, Indianapolis, Ind.  
Clifford J. Laube, Rico, Colo.

#### PASSED ADVANCED EXAMINATION

##### Atesto pri Kapableco.

Miss Celia Doerner, Grants Pass, Oregon.

#### NEW SUSTAINING MEMBER

Mr. J. A. Whitcomb, New York.

#### TREASURER'S ACCOUNT

##### MAY.

##### Receipts.

Cash on hand April 26.....	\$2.19
Membership fees.....	8.50
Examinations .....	13.80
Sustaining membership fees.....	17.00
Sale of extra "Heralds".....	8.63
Sale of enclosure slips.....	.50
Contribution from V. C. Dibble, Jr.	2.50
Loan from Edwin C. Reed.....	15.00
	<hr/>
	\$68.12

##### Expenditures.

Postage .....	\$4.00
Examinations .....	12.75
Stenographer .....	24.00
Electrotypes for "Herald".....	9.50
Office rent.....	12.50
Balance on hand May 27.....	5.37
	<hr/>
	\$68.12

membroj de Sekcio de specialistoj, tiuj sekcioj povus, kiam ili estus sufiĉe fortikaj, fariĝi memstaraj asocioj, konservante tamen moralajn interrilatojn, kun la Scienca Asocio.

Kvankam la korespondantaj statutoj ne estas ankoraŭ oficiale alprenataj de la Asocio, tamen ĝia estraro pensis ke la okazo, kiun ofertas la ideo de Sro. Eittinger estas taŭga por komenci tiun organizadon de specialaj sekcioj, kaj proponis al Sro. Stromboli akcepti ke la formota asocio de inĝenieroj fariĝu komence tia sekcio.



Sro. Stromboli akceptis tiun proponon, tiamaniere la Scienca Asocio povos helpi la starigadon de la formota Asocio de Inĝenieroj.

Sekve ĉiuj inĝenieroj, kiuj deziras aliĝi al tiu lasta Asocio, estas invitataj sendi sian aliĝon al la Scienca Asocio (ĝenerala sekretario Sro. Baillot, 51 rue Gauthier de Chatillon, Lille, France, jara kotizaĵo: 2 Sm. kun abono al la Scienca Revuo: 4 Sm.). Ili estas petataj konigi samtempe

sian intencon partopreni la Sekcion de Inĝenieroj.

Iliaj nomoj kaj adresoj estos konigataj al Sro. Stromboli, kiu bonvolis akcepti la titolon de sekretario de tiu speciala sekcio, kaj zorgos pri ĝia funkciado.

La Samideanoj estas petataj konigi tiun sciigon al ne-esperantistoj precipe, per naciaj teknikaj revuoj.

LA ĜENERALA SEKRETARIO,  
R. Paillot.

### TEOSOFIA ESPERANTA LIGO

Mi prenas permeson atentigi la membrojn de Teosofia-Esperanta Ligo, pri la cirkulero de Doktoro Zamenhof, kiu donas al ni sekvindajn konsilojn. Efektive li klarigas la ĝustan metodon, kiun ni devas uzi por niaj laboroj, dum la venonta Antverpena kongreso, ĉar nia intenco estas utiligi tiel gravan okazantaĵon de internacia renkontiĝo por doni al nia Ligo definitivan organizadon.

Taŭga kunvenejo estos rezervata por niaj kunsidoj, dank' al afablaj prizorgoj de la Loka Komitato de l'kongreso; ni povos do fari utilan, fruktodonantan laboron, se ĉiu Liga Sekcio bonvolos sendi al Ant-

verpena kongreso delegitojn, rajtigatajn por la alprenotaj decidoj.

Estus necese ke, ĉe ĉiu Sekcio, oni antaŭ ekzameni la ĉefajn punktojn, pritraktotajn en ĝeneralaj kunvenoj kaj, por starigi tiun laboron, ĉiu sekciestro, aŭ Liga Sekretario devas interkorespondi unu kun la alia. Tiamaniere ĉe la kongreso, estos nenia konfuzo, aŭ haltigo, ni tuj eklaboros efike kaj bonorde.

Esperante aprobon kaj kunhelpon pri tiu propono, mi salutas tutkore kaj frate ĉiujn gesamliganojn.

Sino. Diou-Trouillon, Prezidantino de la Franca Sekcio, 145, Boulevard Malesherbes, Paris, Francujo.

### ALVOKO AL KRISTANAJ SAMIDEANOJ

Dum la 7a Internacia Esperanta Kongreso en Antverpeno oni aranĝos du kunvenojn por kristanaj esperantistoj. Unu kunveno servos por kristanaj junaj viroj kaj junuloj, la alia por ĉiuj kristanaj samideanoj. La preparoj por la unua jam bone progresas, tiel, ke la kunveno certe okazos en la ĉambro de la K. U. J. V. (rue van Schoonbeke 111) je la 20a de aŭgusto, posttagmeze. Pro la dua kun-

veno oni ankoraŭ interkonsiliĝos koncerne la kunvenejo.

Nun oni nepre devas scii la nombron de la partoprenontoj, kaj pro tio ĉiuj, kiuj intencas viziti la cititajn kunvenojn estas kore petataj, bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ vian nomon al

Sro. Paul Huebner,  
Hubertus str. 45,  
Delbrueck apud Koln (Cologne)  
Germanujo.

### ESPERANTO AT THE PEACE CONGRESS

The Third National Peace Congress, held in Baltimore, May 3-6, was opened by the President of the United States at "The Lyric" before an immense gathering of deeply interested and representative citizens.

Although professedly an American

Peace Congress, it enjoyed a certain degree of internationality, among the speakers being two from Japan, and one each from Canada, France and Switzerland.

The printed program announced the Congress as being held "Under the Auspices of all the Leading Societies of America

Devoted to the Settlement of International Disputes by Means Other Than War." With very little stretch of the imagination, this phrase would include all reputable movements whose ultimate goal is peace, but whose immediate aim is internationalism. Such movements are Esperantism, and also Socialism. The latter had favorable mention by several speakers. Esperantism had also a courteous, though informal attention.

An effort was made at the last moment to have our general secretary placed upon the program to present the "Relation of Esperanto to the Peace Movement," but the list of speakers was already too full. However, the present writer was courteously permitted to place 250 copies of the Herald "Esperanto for the Peace Advocate" on the "Literature Table," and a like number was distributed upon the chairs in the congress hall. The

moment chosen for this distribution was just before the Thursday afternoon session, when our president, Hon. John Barrett, gave an excellent address upon "The Pan-American Union." Practically all of these leaflets were carried away, for a careful examination of the hall afterwards disclosed the fact that amidst the many white leaflets left on the chairs, only two of the Heralds were visible in the whole auditorium. Quite a number were also taken, from time to time, from the Literature Table, which was well stocked with many other leaflets and tracts.

It was my pleasure incidentally to meet several samideanoj from other cities. The eagerness with which every one received the Herald was most gratifying, and indicates a favorable recognition of Esperanto as one of the important "iloj" of universal peace.

James L. Smiley.

### ALVOKO

(pri Okcident-Siberia ekspozicio).

Dum la somero de nuna jaro en urbo Omsk (okcidenta Siberio) estos organizita la unua Okcident-Siberia agrikultura-industria ekspozicio. Tiun ekspozicion kunvenos multaj homoj el malproksimaj anguloj de Siberio kaj Rusujo. Tre grave estas, ke Esperanto estu plej bone reprezentita en tiu ekspozicio, por ke la kunvenintoj disportu la semojn de esperantismo tra la tuta lando. Tial Tomska studenta rondeto decidis preni sur sin la organizadon de esperanto-fako en la ek-

spozicio, kaj ni esperas, ke la tuta esperantistaro unuanime helpos en tiu entrepreno. Ni petas pri alsendo de gazetoj, libroj, p. kartoĵoj ilustritaj, kaj ceteraj esperantaĵoj. Grava estas ankaŭ la monhelpo: la rondeto ne posedas sufiĉe da mono kaj esperas kovri la elspezojn per la enspezoj de vendado en ekspozicio.

La komitato de Tomska studenta esperantista rondeto.

Adreso: Siberio, Omsk

Atamanskaja 6. dom Levina, al A. Skalskij.

### NEKROLOGO.

Ni raportas kun granda bedaŭro la morto de la jenaj bone konataj esperantistoj:

Charles Meray, profesoro ĉe la Universitato Dijon, Francujo, ĝis la pasinta jaro membro de la Lingva Komitato, kaj membro-korespondanto de la Franca Instituto (Akademio de Sciencoj).

Horace Huet, membro de la Lingva Komitato, honora vicprezidanto de la Esperantista Grupo de Parizo, kaj redakcia sekretario de "La Revuo," fondinto de la grupo esperantista en Nice, kaj ĉiamaniere fervora propagandisto kaj literaturisto.

Paul Berthelot, tre energia franca propagandisto, fondinto de la ĵurnalo "Esperanto," kiun li antaŭ kelkaj jaroj transdonis al Sroj. de Saussure kaj Hodler, kaj kunverkisto de la libro "Komercaj Leteroj," kaj aliaj. Li mortis en Brazilo, kien li iris por resaniĝi.

Ernest Taboulech, franca Deputato, membro de la Esperantista Grupo de Parizo, de ĝia fondo.

J. W. van der Wal, vicpastro de la paroĥo Sankta Vilebrordo en la Hago, agema propagandisto inter la nederlandaj katolikoj.



## FOR THE BEGINNER

Will you please tell me why the adverbial form is used in such sentences as "estas tre malvarme?"

In this particular instance it is evident that the adverb *tre* modifies the following adverb, and the word *malvarme* is in the adverbial form because the only word present for it to modify is a verb, namely, *estas*. If a noun or pronoun were present as subject of *estas*, an adjectival form would be used instead.

When the verb has no definitely expressed subject (e. g., is impersonal), or has for its subject an infinitive (a verbal form), the modifiers will necessarily be adverbial, since they must modify what is actually present in the sentence.

This use of the adverb resembles that of neuter adjectives in other languages (the neuter being the form closest to the adverb, Latin even using neuter accusatives for adverbs). A familiar example which is strikingly similar to the Esperanto is the line from Horace, "dulce et decorum est pro patria mori" (dolĉe kaj dece estas pro patrujo morti); and such French impersonal uses as "mentir est honteux" (mensogi estas hontinde) may also be adduced, as well as similar examples from other languages.

It must be remembered that the introductory particle introducing such sentences as "it is raining," "it is cold" (German "es ist kalt," etc.), is not the same as the pronoun "it," and these two English similarly spelled words should not be confused in translation into Esperanto. The particles add nothing to the actual meaning of the sentence, and Esperanto gets along very well without them (See Complete Grammar of Esperanto, 50, 141):

*neĝas tre ofte*, it snows very often.

*ŝajnis agrable en tiu parko*, it seemed pleasant in that park.

*ne estas sufiĉe varme en mia ĉambro*, it is not warm enough in my room.

*ĉu estas permesate fari tion?* Is it permitted to do that?

Appreciation of the above outlined facts will serve also to prevent the omission of pronouns which are needed as subjects

of verbs,—an error often made still more grave by changing to an adverb the adjective which logically agrees with the missing pronoun. Note that "it" is not an introductory particle, but a genuine pronoun in the following examples:

*Mi vidis la libron. Ĝi estas bela* (not "mi vidis la libron. Estas bele").

*Ĝi estas tre bona ĵurnalo* (Compare "Estas tre bona ĵurnalo," which would be translated "there is a very good paper," a suitable introductory particle being supplied in translation).

*Ĝi estas eldonita ĉiun sabaton* (not "estas eldonite ĉiun sabaton," which is really unintelligible).

Please discuss the use of the suffixes *-ec-* and *-aj-*.

The difference between words formed with these two suffixes is simply that between abstract and concrete in our own language. The word *mirindeco* means "marvelousness," "wonderfulness," while *mirindaĵo* means "a marvel," "a wonder," an actual example of something which has the characteristics mentioned. *Beleco* means the abstract quality of beauty, *belaĵo* means "a thing of beauty," a concrete example of embodiment of beauty. The suffix *-ec-* expresses those abstract ideas indicated in English by such suffixes as *-ness*, *-hood*, *-ity*, *-ship*, etc. It is most naturally attached to adjectival roots as in *varmeco*, *agrableco*, *justeco*, etc. The suffix *-aj-* is used with verbal and substantival roots quite as often as with any other, its meaning permitting of this very easily. With verbal roots it indicates that which undergoes or results from the action indicated; as *manĝaĵo*, food; *kreskaĵo*, growth; with substantival roots it indicates the formation from that indicated, as *aranaĵo*, spiderweb, etc. (See Complete Grammar of Esperanto, 227.) As in the use of any other suffixes, care must be taken to understand just what the English means, before translating. It is the vagueness of the English which causes hesitation at first over the really simpler and more logical Esperanto usages.

## KIEL LA HOMO SIN ELTROVIS

**D**UM LA HOMOJ estis sovaĝuloj, kaj sin nutris per ĉasado, ili vagadis. Tial ne povis ekzisti tio, kion oni nomas civilizacio.

La unua paŝo al civilizacio estis malsovaĝigi bestojn, por manĝado kaj portado. La plej valoraj bestoj por ĉi tiuj celoj estis la bovoj, por lakto kaj viando; kaj la ĉevalo, azeno kaj kamelo, por transportado. Sed ĉi tio produktas nur nomadulojn, kiuj estas ankoraŭ malproksimaj de civilizacio. La sekvinta paŝo estis eltrovi kreskaĵojn kiuj povas esti kulturataj por nutraĵo, kaj aliajn kreskaĵojn kiuj povas liveri fibrojn por vestaĵo, k. t. p. Tiam oni konstruas loĝejojn, kaj tiel venas la terkulturado.

Sed terkulturado sola donas ankoraŭ la plej krudan civilizacion. La tria paŝo estis pli grava. Ĝi estis la intersanĝado de produktaĵoj. Tamen intersanĝado fariĝas riĉiganta komerco nur kiam oni eltrovis ilon por faciligi la intersanĝadon. Tiu ilo estis la mono. La sperto instruis homojn ke la du metaloj oro kaj arĝento estas bona materialo por tiu celo. Kun mono, civilizacio kreskis, kaj per ĝi rapide atingis treege altan staton, kiel ekzemple inter la antikvaj egiptanoj, grekoj, kaj romanoj.

Sed la plej alta civilizacio, tia, kia troviĝas inter nunaj nacioj de Eŭropo kaj Ameriko, dependas de la akirado kaj la disvastigado de sciado. En antikvaj nacioj, nur malmultaj anoj ĝuadis la profitojn de civilizacio, dum la granda plimulto laboradis kiel sklavoj. La elpensado de presmaŝino, aŭ, pli precize, la eltrovo de la arto presigi per disigeblaj preslitteroj, kiu ebligis ke preskaŭ ĉiu homo povu lerni legi kaj havu okazon uzi sian novan scipovon, estis eble la plej granda paŝo al civilizacio. Kaŭze de tia disvastigado de sciado, okazis la multaj eltrovoj kaj elpensoj de la pasinta jarcento, kiuj tiel grandmezure plibonigis la kondiĉojn de vivado. La eltrovo de giganto en kaldrono,—de kiu devenis la vapormaŝino,—kaj de lia frata genio nomata elektro, nun aljungita por fari ĉiajn

## HOW MAN FOUND HIMSELF.

**W**HILE MEN were savages, and lived by the chase, they roamed about. Therefore there could not exist that which we call civilization.

The first step toward civilization was to domesticate animals, for food and transportation. The most valuable animals for this purpose were cattle, for milk and flesh; and the horse, ass and camel, for transportation. But this produces only nomads, who are still far from civilization. The next step was to discover plants which can be cultivated for food, and other plants which will yield fibres for clothing, etc. Then dwellings are constructed, and thus comes agriculture.

But agriculture alone produces only the crudest civilization. The third step is most important. It is the exchange of products. Yet interchange becomes wealth-producing commerce only with the discovery of a medium for facilitating the exchange. That instrument was money. Experience taught men that the two metals gold and silver are good material for this purpose. With money, civilization grew, and through it rapidly attained an exceedingly high state, as for example among the ancient Egyptians, Greeks and Romans.

Yet the highest civilization, that which is found among present nations of Europe and America, depends upon the acquisition and diffusion of learning. In ancient nations, only a few of the people enjoyed the advantages of civilization, while the great majority toiled as slaves. The invention of the printing-press, or, more exactly, the discovery of the art of printing by separable letters, which made it possible that nearly every man should be able to learn to read and have the occasion of using his new accomplishment, was perhaps the greatest step toward civilization. Because of this diffusion of knowledge have occurred the many discoveries and inventions of the past century, which to so great an extent have ameliorated the conditions of life. The discovery of a giant in the tea-kettle,—from which came the steam engine,—and of his brother genie named electricity, now harnessed up to do all sorts of



miraklojn, estas nur du el la rimarkindaj rezultatoj.

Pro la elpensinto de kredito kun ĝiaj multaj disbranĉigoj, la potenco de mono multobliĝis en la komerca mondo. Plie, la elpensado de asekurado kontraŭ morto, fajro, k. t. p., tiamaniere disdividas perdojn, ke la sufero ne falas tro peze sur unu aŭ alian komunumon.

Ĉio tio multe faris pro civilizacio kaj la pligrandiĝo de feliĉo. Tamen ankoraŭ nun tro multaj homoj havas severan vivon. Tro multaj ankoraŭ laboras treege, kaj ricevas nur malmulte da pli altaj plezuroj de la menso kaj spirito.

Antaŭ dudek kvar jaroj alvenis plej rimarkinda elpenso, plej bonfariĝonta al la homaro, nome, la ellaborado de lingvo facila kaj samtempe kapabla de tiel senlima kreskado ke ĝi povos esprimi ĉiun ideon de la homa menso. Lerninte ĉi tiun lingvon, ĉiuj homoj el ĉiuj nacioj povas kompreni ĉiun alian homon el kiu ajn nacio. Same kiel la presmaŝino kreskigis la civilizacion de la deknaŭa jarcento per disvastigado de sciado, tiel Esperanto kreskigos eĉ pli altan, pli belan kaj pli grandan civilizacion, en la dudeka kaj sekvontaj jarcentoj, kiam ĉiu nacio posedos por si la pensojn kaj eltrovojn de ĉiu alia nacio, kaj ĉiu povos tuj kompreni la alian. Plie, la esperantismo multege helpas la ideon ke la homo ne vivas pro si mem sed ankaŭ pro siaj kunhomoj, kaj per tio atingos sian propran kaj altan bonstaton. La frateco de homaro tiam fariĝos io pli reala ol sonĝo, dank' al Esperanto.

J. M. Nickles.

miracles, are but two of the noteworthy results.

Because of the invention of credit, with its many ramifications, the power of money has increased manyfold in the commercial world. Further, the discovery of insurance against death, fire, etc., so distributes loss that the suffering does not fall too heavily upon one or another community.

All this has done much for civilization and the increase of happiness. But even now too many human beings have too hard a life. Too many still work hard and get but little of the higher pleasures of mind and spirit.

Twenty-four years ago came the most remarkable discovery, the one to be most productive of good to mankind—namely, the elaboration of a language easy and at the same time capable of so limitless a growth as to be able to express any conception of the human mind. By learning this language, all men of all nations can understand any other man of any other nation. Just as the printing press increased the civilization of the nineteenth century by its diffusion of learning, so Esperanto will produce ever a higher, finer and greater civilization, in the twentieth and succeeding centuries, when every nation will have for its own the thoughts and discoveries of every other nation, and every one can at once understand the other. Moreover, Esperantism will greatly assist the conception that man lives not for himself, but also for his fellow-men, and thereby attains his own peculiar and highest welfare. The brotherhood of man will then become something more real than a dream, thanks to Esperanto.

#### WHY STUDY ESPERANTO?

The following quotation from a letter recently received by the bookselling department of the American Esperantist Company shows one good reason for learning Esperanto, and indicates why the small amount of time necessary to master it is time well spent by the majority of persons:

"Mi estas naskita en eŭropa Turkuje laŭnacia bulgaro. Mi studas Esperanton jam kelkajn monatojn, kaj trovis ĝin pli facila lingvo ol la lingvo angla. En Ameriko mi jam plenumas kvin jaroj, kaj ankoraŭ ne povas paroli nek skribi anglan lingvon, pro kio mi uzas tie ĉi Esperanton."

## ANTVERPENO KAJ LA SEPA KONGRESO

(Kun grandega plezuro ni prezentas al la legantoj de **Amerika Esperantisto** artikolon pri Antverpeno kaj la Sepa Kongreso (20-27 de aŭgusto, 1911), verkita speciale por ni, de Sro. Van der Biest-Andelhof, kunlaboranto de **Amerika Esperantisto**, prezidanto de la organiza komitato de la venonta internacia kongreso de Esperanto, kaj bone konata tra la esperantista mondo. Tial ke, dum tiu grava semajno en aŭgusto, ĉiu esperantisto el ĉiu nacio ĉeestos en Antverpeno, ĉu efektive per la korpo ĉu nur spirite per siaj imagpovo kaj bondeziroj, la jena priskribo, kun kelkaj detaloj pri la kongreso mem, estas tre interesa:—Red.)

**T**RAPASINTE la markolon de Calais, kaj preterveturinte la francan havenurbon Dunkerque, oni tuj ekvidas la belgan marbordon, karakterizatan per aro da sablaj montetoj, nomataj "dunoj." Inter la dunoj dissemataj, sin montras intersekve la banurboj Nieuwpoort, Oostende, Blankenberge, Heyst, Knokke; iom post iom la veturado estas direktata dekstren, ĝis fine la malapero de la ŝipskuado sentigas, ke oni estas en sensala akvo. Oni efektive enveturas la Skeldon (angle, Scheldt; flandre, Schelde; france, Escaut), ekvidas maldekstre la nederlandan urbon Vlissingen (angle, Flushing; france, Flessingue), kie estas unu momenton haltigate por enŝipigi la piloton, kiu estros la ŝipon ĝis Antverpeno (angle, Antwerp; flandre, Antwerpen; france, Anvers).

Majesta estas la aspekto de la ejo, kie la Skeldo enfluas la Nordan maron. La panoramo de Vlissingen silhuete montriĝas sur la horizonto; en la malproksimeco, norden, vidiĝas Middelburg, ĉefurbo de Zelando; ambaŭflanke, trans altaj kaj fortikaj digoj, etendiĝas senfinaj paŝtejoj. La ŝipveturado estas tre intensa. Dum fortajdo altiĝas multaj sablorifoj super la akvonivelon, kie en varmaj someraj tagoj amasiĝas multe da fokoj.

Dekstre, la urbeto Terneuzen, de kie larĝa kaj profunda kanalo sin direktas al la belga urbo Gento (angle, Ghent; flandre, Gent; france, Gand). Maldekstre, la Sub-Bevelanda kanalo, kiu komunikigas Antverpenon kun Rotterdam. De Hansweert, kie la kanalo komenciĝas, oni ekdistingas la turon de la Antverpena katedralo.

Ĝis nun oni veturis sur la nederlanda

teritorio; du kilometrojn preter la fortiko Bath, kie brako de la Skeldo fluas norden, oni envenas Belgujon. La riverego mallarĝiĝas; oni rimarkas ambaŭflanke fortikojn, apartenantajn al la defend sistemo de Antverpeno; la urbo fariĝas pli kaj pli videbla, super ĝi regas grandioze la alta, eleganta turo de la ĉefpreĝejo. En la perspektivo aperas la vastaj dokoĵ, kun amasego da mastoj; la Skeldo faras grandan kubuton; malrapidiĝas la antaŭenirado de la ŝipo, kiu fine haltas. Neeviteblaj formalajoj kun la doganoficistoj, kaj jen...oni piedpremas la Antverpenan teron.

\* \* \* \* \*

La unua impresio, kiun naskas Antverpeno, estas tiu de ĉarma, artplena agrabla urbo. Forlasinte la ŝipon, kaj sekvinte la Skeldon ĝis la flosponto, oni alvenas ĉe granda stratĉeno, kiu trapasas la urbon de la okcidento ĝis la oriento. Maldekstre, la Granda Placo kun la Urbestrarejo, kaj la artplena fontano de Brabo, kiu memorigas la legendon pri la deveno de Antverpeno. Apud la Granda Placo estas la Gantvendejo, kun la superbela katedralo. Kelkajn paŝojn pli malproksime, la Verda Placo, bela skvaro borderita per arboj; en la mezo, bronza statuo de la mondfama pentristo Rubens.

Oni trapasas la komerceman ŝuvendejon (flandre, Schoenmarkt; france, Marche aux souliers), kaj jen la luksa Meir (elp. Mejr) placo, kun riĉaj konstruaĵoj, inter kiuj la reĝa palaco kaj la naskiĝa domo de Rubens. La plilongigo de la Meirplaco estas la strato Leys (elp. Lejs), kun imponantaj konstruaĵoj, kaj la bulvarado De Keyser (elp. Kejzer), apartigita de ĝi per la larĝa bulvarado de l' Artoj (flandre,



Kunstlei; france, Avenue des Arts). (Leys kaj De Keyser estis famaj antverpenaj pentristoj.) Maldekstre de tiu bulvarado, kelkajn domojn preter la granda hotelo Weber, estas rimarkinda la flandra operejo, kiun, laŭ afabla permeso de la urbestro, la organiza komitato senpage disponos de la 19a ĝis la 27a de aŭgusto.

Je la ekstremaĵo de la stratoj (maldekstre) inter la Bulvarado de l' Artoj kaj la centra stacidomo, troviĝas la Reĝa Ateneo, kie estos organizataj la kongresaj kunsidoj, la akceptejo kaj la ekspozicio. En la fono de la Bulvarado de Keyser altiĝas la grandioza centra stacidomo, kun du riĉe ornamitaj fasadoj; unu aspektas sur la urbon, antaŭ la alia etendiĝas bela florgardeno.

Antverpeno enhavas diversajn tre rimarkindajn muzeojn, kies eniro estos senpaga por la kongresanoj. La muzeoj de Belaj Artoj (Placo Leopold de Wael) posedas multajn ĉefverkojn de la malnova flandra skolo, kune kun tre vidindaj modernaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj. La muzeo Plantin, sur la Vendreda Vendejo (flandre, Vrytagsche Markt; france, Marche du Vendredi), malproksime de la Verda Placo, patricia domo el la XVIa jarcento, estas io unika en la mondo. Ĝi montras la diversajn fazojn de la pres- kaj gravurarto; la konstruaĵo enhavas 30 diversajn riĉe meblitajn salonojn kun belaj familiaj portretoj. Tre vidindaj estas ankaŭ la muzeo de antikvaĵoj, "het Steen," tre originala mezepoka konstruaĵo laŭlonge de la bordmarŝejo de la Skeldo, kaj la salonoj de la Urbestrejo.

Multaj preĝejoj estas superbelaĵ, precipe la jam citita katedralo, tiuj de S-ta Jakobo, S-ta Paŭlo, kaj S-ta Jozefo.

La urbo enhavas kvin grandajn teatrojn. Multnombraj statuoj ornamas ĝiajn publikajn placojn kaj parkojn. Ni ne forgesu la zoologian ĝardenon, ampleksan je 10 hektaroj, kies enirejo troviĝas flanke de la centra stacidomo. Ĝi estas unu el la plej vizitindaj en la tuta mondo. En la belega kaj vasta festhalo aŭ en la ĝardeno okazas ĉiutage koncertoj.

Plej rimarkindaj estas la haveninstalaĵoj de Antverpeno. La kajoj, kun masonitaj muroj, dikaj je unu metro kaj profundaj je 14 metroj, etendiĝas naŭ kilometrojn laŭlonge de la Skeldo; ili estas larĝaj je 100 metroj, kaj laŭirataj de vastaj komfortaj ŝirmejoj. Norden de la urbo, 15 dokoĵ kovras pli ol 120 hektarojn; suden troviĝas tri aliaj por la enlanda ŝipveturado. Du promenejoj laŭiras la Skeldon; de tie oni povas rigardi la flandran bordon de la riverego (la Skeldo apartigas du belajn provincojn: orientan flandron, kies ĉefurbo estas Gento, kaj Antverpenon, kies ĉefurbo estas Antverpeno), kaj plej detale vidi la ŝarĝadon kaj senŝarĝadon de la ŝipoj, kaj la senripozan laboron de la havena vivado.

\* \* \* \* \*

Pri la kongreso mem: Ĝis nun (la 10an de majo) pli ol 700 esperantistoj aliĝis; antaŭvideble tiu nombro triobliĝos. Al tiuj, kiuj intencas partopreni en la kongreso, la organiza komitato esprimas insistan alvokon ke ili senprokraste enskribiĝu.

Estas la tasko de tiu komitato kiel eble plej solenigi la grandan internacian kunvenon de la esperantista samideanaro, ankaŭ interesi la tutmondajn vizitantojn kaj agrabligi ilian restadon en Antverpeno. La grandaj trajtoj de la programo estas konataj: festa akceptado de nia kara Majstro, aŭdado de flandraj kantoj, literatura konkurso, prezentado de la emocianta teatraĵo Kaatje (kies geinterpretantoj estos aktoroj de la Reĝa flandra teatro), balo, kaj post la kongreso sestaga ekskurso tra Belgujo.

Nia patrujo ne estas vasta; malpli vasta estas la flandra regiono, kies artan kaj intelektan movadon Antverpeno alcentriĝas. Tamen, ĉiuj allogaĵoj de la VIIa kongreso portos la stampon de la originaleco de nia hejma vivado. Tio certe plaĉos al niaj bonvenaj gastoj, kaj donos al ili profundan konon pri nia intima sento.

Van der Biest-Andelhof,  
Prezidanto de "la Sepo por la Sepa."

#### THE TRIP TO ANTWERP.

The attention of the members of the "Nordamerika Karavano al Antverpeno" is called to the following matters:

The itinerary has been arranged as follows (subject to minor changes):

Sail from New York on the steamer

"Kroonland" Saturday, August 5, at 10.00 A. M., arriving in London Saturday, August 12 (the hour depending upon the time of landing at Dover).

Leave London Wednesday, August 16, at 2.20 P. M., arriving in Paris at 9.16 P. M.

Leave Paris Saturday, August 19, at 12.40 P. M., arriving in Antwerp at 5.45 P. M. (this trip subject to change of hour, as a special Esperantist train will probably be arranged from Paris to the Congress City).

Leave Antwerp Saturday, August 26, at 1.32 P. M., arriving in the Hague at 4.37 P. M.

Leave the Hague Sunday, August 27, at 4.42 P. M., arriving in Amsterdam at 5.39 P. M.

(Special steamer excursion to the island of Marken, in the Zuiderzee, returning through the North Holland Canal, Monday or Tuesday).

Leave Amsterdam Wednesday, August 30, at 9.35 A. M., arriving in Cologne at 3.16 P. M.

Leave Cologne Thursday, August 31, at 1.42 P. M., arriving in Brussels at 6.05 P. M.

Leave Brussels Friday, September 1, at 4.54 P. M., arriving in Antwerp at 5.45 P. M.

Sail from Antwerp Saturday, September 2, for New York.

It will be noted that in the above program there is no travelling at night. This has been carefully planned with a twofold purpose; first, so that there will be a minimum of physical fatigue (which arrangement is much pleasanter even where the railroad distances are so short as above), and secondly, so that as much of the local scenery as possible may be enjoyed from the car windows. The trip from Amsterdam to Cologne is by way of Dusseldorf, which is the preferable route on account of the scenery.

Mail for members of the Karavano may

be addressed in care of Mr. Edwin C. Reed at the following hotels:

London (to be announced later).

Paris, Hotel Palais d'Orsay.

Antwerp, Grand Hotel Weber.

The Hague, Hotel Victoria.

Amsterdam, American Hotel.

Cologne (to be announced later).

Brussels (to be announced later).

Arrangements will also be made for some one hotel in New York, for all the members of the Karavano who arrive before the date of sailing. The hotel chosen will be announced later. Steamer letters should be addressed as follows: "———, on Board S. S. Kroonland, Red Star Line, sailing August 5."

The number of members of the karavano for the entire trip is now twenty; others will take part for certain portions of the trip, either before or after the congress, while still others will be with the party for only the ocean voyage. A few places are still held for any who wish to join the karavano, but were not able previously to make definite arrangements, also a few places are held on the steamers sailing for Antwerp a week later than the party starts, and sailing for New York immediately at the close of the Congress, to accommodate any whose business necessitates such arrangement. But all reservations not engaged within a very few days after this issue of *Amerika Esperantisto* appears will have to be cancelled with the steamship company, as passage is already at a premium. Therefore any persons who wish to join the karavano for all or part of the tour, but have not yet registered, are requested to address the "Nordamerika Karavano" (at The Esperanto Office, Washington, D. C.) at once, in order that they may be duly booked; and that any special arrangements may be made, if only part of the tour is desired. (Cost of entire tour, \$250. For description of trip see *Amerika Esperantisto* for January.)

#### ADDITIONAL SUBJECTS AND PRIZES FOR THE LITERARY CONTEST

"Originala studo pri historio, literaturo aŭ arto." Maksimume 50 presitaj paĝoj de "La Revuo." First prize, 40 Sm.; second prize, 20 Sm.

Offered by "La Revuo."

"Kvarversajo, temo laŭvola," Prize, 20 Sm. Offered by "Fervoro," esperantist group in Antwerp.



“La plej taŭga konciza klarigo de la esencoj de ĉekoj kaj transpagiloj kaj ilia tasko kaj utilo en la komerca pagado, facile komprenebla al tute nesperta kontulo, tiamaniere ke li sen plua instruo nepre ekvidas iliajn utilojn kaj praktike ilin povas uzi.” Prize, Credit of 25 Sm. at the Ĉekbanko, offered by Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London.

“Rakonto, Novelo, versajo, pri iu ajn temo, “verkita de persono malpli ol 20-

jara. Prize, “bela arta objekto,” offered by “Juneco.”

“Rolo de la virinoj en la esperantista movado, plej taŭgaj rimedoj por enkonduki Esperanton en la internaciajn virinajn instituciojn.” Prize, 12 Sm., offered by Miss Maria Moreau, Brussels.

“Soneto, temo laŭvola,” Prize, 5 Sm., offered by John P. Nix, Eastbourne.

“Originala Rakonto” (4000-5000 vortoj). Prize, 10 Sm., offered by Edwin C. Reed, Washington.

## INTERNACIA EKSPozICIO

POR VOJAĜO KAJ TURISMO EN BERLIN.

**U**NU EL LA PLEJ BELAJ ekspozicioj specialaj, kiujn mi ĝis nun vidis, estas tiu ĉi I. E. p. V. k. T., kiu havas lokon en la grandegaj ekspoziciaj haloj apud la Berlin'a Zoologia Ĝardeno, de la 1a de Aprilo ĝis la 20a de Junio. Ĝi distingiĝas de similaj ekspozicioj precipe per la fakto, ke ĝi ne sole preferas la akcelon de materiaj interesoj, sed antaŭ ĉio ĝi estas entreprenita por vigligi la ĝojon pri amuza vojaĝado kaj turismo, kaj favori amikajn interrilatojn inter la diversaj nacioj. Por la vojaĝanto kaj turisto ne ekzistas politikaj limoj; ili iras tien, kie ili opinias trovi belajn regionojn kaj mallaciĝon de la ĉiutaga laboro. Tiajn lokojn prezentas la I. E. p. V. k. T. en granda abundeco. Ne estas eble priskribi en mallonga artikolo ĉiujn vidindaĵojn de la ekspozicio; tio postulus verkadon de ampleksa volumo. Tie ĉi mi nur povas koncize raporti pri la plej gravaj elmontraĵoj. Kiu interesiĝas pri detaloj—venu mem kaj vizitu la ekspozicion. Do, kara leganto, sekvu min en spirito, ni volas trarapidi la du grandajn halojn de la ekspozicio.

Kompreneble estas, ke en entrepreno, kiu estas vere internacia, kaj kiu celas faciligi la internaciajn interrilatojn, ne devas manki nia internacia lingvo. Kaj ĝuste ĉe ĉiu enirejo oni jam ekscias, ke Esperanto estas reprezentata, per jenaj afiŝoj: “Esperanto Informejo sur la galerio en la ĉefa halo.” Enirinte tra la ĉefa enirejo oni ankaŭ tuj ekvidas antaŭ si sur la galerio la oficialan informejon

de Germana Esperanto-Asocio kaj U. E. A., sole signitan per la vorto, “Esperanto,” kiu brilas sur la supra parto de la informejo kaj estas videbla preskaŭ de ĉiu loko en la halo. Sed pri la esperanta afero mi parolos poste, unue ni rigardu la aliajn vidindaĵojn.

Ni turnu nin maldekstren. Post kelkaj paŝoj ni staras surprizitaj antaŭ grandega dioramo, kiu okupas vastan pordon de la halo ĝis la plafono. Ĝi montras la insulon Rugen en la Balta maro tiel laŭnature, ke oni opinias sin vere troviĝanta antaŭ la kretrokoj de tiu fama insulo. Krom tio, multaj bildoj kaj aliaj objektoj atentigas pri la diversaj banlokoj kaj admirindaj punktoj de Rugen. Belega ankaŭ estas la panoramo kaj plastika montro de “Glatzer Gebirgsland” kaj parto de “Riesengebirge” en Silezujo. Kun mirinda natureco estas kopiitaj la montoj kun siaj ĉarmaj valoj, en kiuj sidas pli-malpli konataj banlokoj, ekz. Schreiberhau, Hermsdorf, Krummhubel k. a.—Tiu ĉi panoramo okupas la mezon de la halo. Irante al la alia flanko, ni tuj troviĝas en la ekspozicio de “Elsass-Lothringen,” la lando de l'kasteloj. Tiun ĉi nomon la bela regiono vere meritas! Multaj el la kasteloj kaj ruinoj estas montrataj per artaj pentraĵoj kaj foto-grafaĵoj, dum aliaj bildoj kaj plastikaj modeloj vidigas la belecon de la romantikaj “Vogesen.” Apud Elsass-Lothringen ni trovas la ekspozicion de “Baden,” en kiu estas vidindaj du bele faritaj dioramoj de la urbo Baden-Baden kaj de

"Triberger Wasserfall," la plej granda akvofalo de Germanujo. Sekvas la kolektiva ekspozicio de la ĉarma Turinga lando. Ĝi okupas tre grandan lokon kaj montras per multege da artaj bildoj, malgrandaj dioramoj kaj plastikaĵoj la diversajn vizitindajn urbojn kaj vilaĝojn en la ebenaĵo kaj inter la montoj. Por ni esperantistoj estas speciale interesaj la bildoj de Gotha, kie havis lokon la kvara germana Esperanto-Kongreso. Proksime de Turingujo troviĝas la elmontraĵoj de "Bund Deutscher Verkehrsvereine" (asocio de germanaj unuigoj por interrilatoj) inter kiuj estas vidaĵoj de multaj germanaj urboj. Reprezentata estas ankaŭ Augsburg, la urbo de la antaŭjara germana Kongreso, kiu same kiel Potsdam elmontras esperantajn gvidlibrojn. Tre rimarkinda estas la ekspozicio de la reĝlando Saksujo. Antaŭ ĉio altiras nin dioramoj de Dresden kaj "Saksa Svisujo," kiuj lokoj certe ankoraŭ estas en bona memoro de la partoprenintoj de la Kvara Internacia Kongreso. Sed la saksa lando ankaŭ montras pruvojn de la diligento kaj lerteco de sia loĝantaro, elmetinte specimenojn de belegaj punktoj, mane faritaj en Plauen kaj ĉirkaŭaĵo.

Nun ni iru en la apudan grandan halon, kies teretaĝo kaj plej granda parto de la galerio estas rezervitaj por la "eksterlando." Kaj tuj komenciĝas la malfacilaĵoj raporti pri la belaj de la ekspoziciitaj landoj. Unu parto estas ĉiam pli bela ol la alia! Nu, ni unue rigardu la altajn regionojn de Svisujo, la "plej bela lando de la mondo," kiel diras Baron Hans von Grotewill en sia taglibro (Vidu "Book Reviews"). Kaj ŝajnas al mi, ke li estas prava! Fortega deziro ekkaptas la rigardanton, vidi en realeco la belajn regionojn kaj travagi la majestatan alpan montaron. Min ravis precipe tri belegaj panoramoj de Zurich, Vierwaldstaedter See kaj Genevo. Ne malpli bela estas la ekspozicio de Aŭstrio, kiu detale konigas al ni la vizitindaĵojn de tiu multpopola lando. Ni vidas partojn el la aŭstriaĵaj montaroj kaj elegantajn banlokojn, el kiuj multaj sin trovas en tiu ŝtato benita de la naturo. La aŭstriaĵaj landoj pace konkuras en la ekspozicio per elmontro de siaj plej belaj vidindaĵoj. Interesaj estas ankaŭ la kostumoj de la diversaj aŭstriaĵaj popoloj,

montrataj per kolekto de grandaj pupoj.

Pli kaj pli la nordaj landoj fariĝas la celo de la vojaĝantoj kaj turistoj; eĉ dum la vintro ili estas ĉiam pli vizitataj pro siaj neĝaj regionoj, kiuj favoras la vintran sporton. Tial estas kompreneble, ke la landoj Danujo, Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando montras al ni siajn belajn tiel allogajn, ke oni tuj deziras forvojaĝi kaj viziti la nordajn regionojn. Krom admirindaj panoramoj ili prezentas ankaŭ produktaĵojn de siaj enloĝantoj. Sed ni ne forgesu la ĉarman holandan ekspozicion, kiu prezentas al ni malnovan holandan ĉambron, el kiu oni rigardas al bela diorama de holanda pejzaĝo. Aliranta al la holanda ekspozicio ni vidas ekspozicion de la holanda kolonio Javujo, kiu montras al ni siajn strangaĵojn.

Sur la galerio de la dua halo ankaŭ havas lokon la tre interesa ekspozicio de la malnova urbo Lubeck, kie okazos la nunjara germana Kongreso. Preteririnte ĝin, ni ankoraŭ unufoje estas ravitaj de belegaj dioramoj de la "Braunschweiger lando," kiuj montras al ni interesajn urbojn, kaj lokojn el la "Harz," la ĉefa montaro de tiu lando.

Nun ni estas revenintaj en la ĉefan halon kaj staras antaŭ la Esperanto-Infirmejo. Ĝi okupas amplekson de 20 kvadratmetroj, kiun la ekspozicia direkto, ekkoninte la gravecon de Esperanto, senpage disponigis al G. E. A. La loka komitato, kiu starigis la informojn kaj aranĝis la aliĝintan esperantan ekspozicion, klopodis havigi al si abundan materialon, por evidente pruvi la disvastiĝon kaj praktikan uzadon de nia lingvo. Ke la aranĝintoj bone sukcesis, estas videble je la unua rigardo. Sed ni eniru kaj detale rigardu la elmontraĵojn. En la mezo de la infirmejo, kiu estas konstruita kiel ĉambro, staras longa tablo, plenkita per lernolibroj kaj vortaroj por multaj naciaj lingvoj, plie per komercaj prospektoj, katalogoj kaj gvidlibroj. Super la tablo pendas sur mallarĝa stablo en longa vico precize 107 esperantaj gazetoj vivantaj, oportune lokitaj. Ĉe la dekstra muro troviĝas granda bretaro kun multaj fakoj, en kiuj estas elmetitaj la ĉefaj verkoj de la esperanta libraro ĉiufaka. Elmeti la tutan libron estis simple neeble, ĉar tio postulus kvaroblan spacon. Sur la maldekstra muro estas fiksita la



objektoj de U. E. A.: statistikaj kartoj, gvidfolioj, propagandiloj, plie komercaj prospektoj kaj aliaj aĵoj, kiuj atentigas pri la praktika uzado de Esperanto. Tute supre sub la plafono pendas sur ambaŭ muroj la Demonstraciaj Tabeloj de Esperanto Verlag Moller & Borel, kiuj mirigas la vizitantojn pri la logika kaj simpla konstruo de nia lingvo. Super la enirejo oni pendigis grandan kolekton de esperantaj muzikaĵoj. La tuta riĉhava ekspozicio estas bone aranĝita, mi eĉ kuraĝas diri: ĝi estas preskaŭ tro plena, kvankam ankoraŭ ne estas elmetita la tuta disponebla materialo! Tamen la ekspozicio bonege efikas, kaj multege da personoj ĝin vizitas. Ili estas detale informataj pri nia afero de Berlin'aj gesamideanoj, kiuj dum la tuta daŭro de la I. E. p. V. k. V. alterne ĉeestas. Ofte, precipe dimanĉon, la alfluo de interesuloj estas tiel granda, ke eĉ 6 ĉeestantaj informantoj ne povas plenumi ĉiujn dezirojn. Kaj de tago al tago kreskas la nombro de la vizitantoj de la I. E. p. V. k. T., tiel ke la esperanta ekspozicio ankoraŭ rajtas atendi ĉiam pli grandan viziton. Jam multaj germanaj kaj alilandaj esperantistoj ĉeestis kaj esprimis sian ĝojon pri nia ekspozicio. Inter ili estis samideanoj el Anglujo, Hispanujo, Rusujo, Egiptujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Holandujo, Hungarujo, Ameriko, k. a. Sed estas certe, ke ankoraŭ venos pli multe da esperantistoj el diversaj landoj, ĉar U. E. A., laŭ oficiala komisiono de la ekspozicia direkto klopodos aranĝi kara-

vanojn al Berlin. Detalojn pri tio oni trovos en la gazeto "Esperanto."

Granda ankaŭ jam estas la nombro de la personoj, kiuj per nia ekspozicio estas gajnitaj por nia afero, kaj konstante la nombro kreskas. De Pasko ni havos plian interesajon en nia informejo; La Berlin'a firmo Aktien-Gesellschaft fur Lehrmittel-Apparate, kiu instruigas fremdajn lingvojn per helpo de fonografo, disponigos al ni aparaton kun esperante enparolitaj cilindroj. Per tio ni povos aŭdigi esperantajn tekstojn en poezio kaj prozo, por montri la belsonecon de nia lingvo. Unu el la cilindroj surhavas monologon el "Hamleto," parolitan de la fama aktoro Emanuel Reicher, la aranĝinto de la Ifigenio-prezentado en la Kongreso de Dresden, 1908. La firmo ankaŭ interrilatis kun G. E. A. pro enparolo de esperanta teksto por kursoj. Jen grava afero, pri kiu ankoraŭ estos detale raportata.

Dankon ni ŝuldas ankaŭ al tiuj personoj kaj entreprenoj, kiuj helpis la lokan komitaton per mona subteno aŭ pruntedonado de ekspoziciaĵoj aranĝi tian belan kaj efikplenan esperantan ekspozicion.

Entute le I. E. p. V. k. T. estas vera vidindaĵo, kaj neniu hezitu viziti ĝin. Multege da elmontraĵoj mi ne povis mencii, kaj oni pardonu, se mi ĝuste forgesis ion, pri kio unu aŭ alia samideano volonte ion estus aŭdinta.

F. Ellersiek,  
Berlino, Germanujo.

## LA SEKRETO DE AMO

DE WILLIAM BLAKE.

Ne esprimu vian amon;  
Amo estas nedirebla;  
La venteto dolĉa spiras  
En silento nevidebla.

Mian amon mi esprimis;  
Ĉion el la koro diris;  
Ŝi, malvarma kaj tremanta,  
Kun timo tuj foriris.

Baldaŭ post foriro ŝia,  
Vojaĝanto tien venis;  
Nevidebla kaj silenta,  
Per ekĝem' li ŝin forprenis.

*El la angla tradukis*  
CLARENCE BICKNELL,  
Bordighera, Italujo.

## LA TOLLIVER' AERŜIPO

**E**N LA URBO SAN DIEGO, ŝtato Kalifornio, Usono, estas nuntempe konstruata aerŝipo, kiu superos ĉiujn similajn antaŭe faritajn aerŝipojn.

Forme ĝi similas cigaron, escepte ke ambaŭ ekstremoj estas konusaj. Ĝia longo estas 250 futoj, kaj la skeleto konsistas el aluminaj ringoj, kies plej granda diametro estas 40 futoj. La perimetro de ĉiu ringo estas farita el du plataj aluminaj pecoj, unu colon larĝaj kaj okonon da colo dikaj, kunigitaj per vinktoj. Tiuj ĉi ringoj estas metitaj unu flanke de la alia, je distanco de ses futoj, kaj kunigitaj per aliaj similaj aluminaj pecoj, ankaŭ metitaj ses futojn unu de la alia, laŭlonge etenditaj laŭ la flankoj de la aerŝipo. De la perimetro de ĉiu ringo sin etendas multaj stalaj fadenoj, kunligitaj ĉe la centro same kiel la radioj en rado de biciklo. Ankoraŭ aliaj metalfadenoj estas laŭlonge etenditaj, tiamaniere kunligitaj por fortikigi la skeleton en ĉiu direkto.

La skeleto estas kovrita de "pongee" silko, ŝmirita dek du fojojn per speciale preparita ŝmiraĵo, kiu por la lasta tavolo estas mikŝita kun alumino. Tiu ĉi cigarforma kovraĵo entenos gason dum periodo de naŭ monatoj, sen perdo de gaso, nome, kvinoble pli longe ol la plej bona teksaĵo ĝis nun farita por kovraĵo. La randoj de la preparita silko estas metitaj inter ĉiuj du supre-nomitaj ringoj, kiuj faras la perimetron de la ŝipo, kaj tenitaj ĉe ĉiu ringo per cemento kaj vinktoj. Oni uzis preskaŭ dek mil metrojn da silko, kaj 368,000 vinktoj ĝin alligas al la skeleto.

Por pleniĝi la gasujon estas bezonataj proksimume kvardek kilolitroj da gaso. Tiu kvanto havas sufiĉe da altleva povo por egali la pezon de la ŝipo kune kun ĝia ŝarĝo, sed ne estos uzata por ĝin levi aŭ mallevi.

En la ŝipo troviĝas kvin ĉambroj. Meti la vojaĝantojn, ŝarĝon kaj maŝinaron internen de la ŝipo estas unika ideo. En antaŭaj aerŝipoj oni subpendis ĉi tiujn sub la ŝipo, kelkfoje je eĉ dekmetra dis-

tanco. Sed en la Tolliver' aerŝipo, ĉio ĉi estos interne de la gasujo, ĉirkaŭita de gaso, tamen apartigata de ĝi per muroj faritaj el tia sama materiala, kia la ekstera kovraĵo. Ĉe ambaŭ ekstremoj de la ŝipo estas ĉambroj aranĝitaj por uzado de piloto kaj maŝinisto, kaj por gasmaŝino. En la mezo estas ĉambro por la pasaĝeroj, kaj ambaŭflanke de tiu estas ankoraŭ aliaj ĉambroj por la maŝinaro kiu funkcigas la flankajn puŝilojn. De unu ĉambro al alia estas trairejoj altaj proksimume du metrojn, larĝaj preskaŭ duonon da metro, per kiuj oni povas iri de unu fino de la ŝipo ĝis la alia, kaj fenestroj elrigardas el la pasaĝera ĉambro, per specialaj trairejoj sammaniere kovritaj de la silka kovraĵo.

Kiel supre dirite, la gaspovo ne estos uzata por levi la ŝipon, aŭ ĝin antaŭen movi. Ĝia mova forto estas ses puŝiloj, nome, unu ĉe ĉiu ekstremo kaj du ĉe ĉiu flanko. La ekstremaj puŝiloj, kies diametro estas pli ol dumetra, havas kvar platajn stalajn brakojn, returneblajn, kaj per fleksebla ŝafto, malproksima duonon da metro, alligitajn al gasmaŝino kies forto egalas la forton de tridek ses ĉevaloj. Per tiu fleksebla ŝafto oni povos turni la puŝilon supren, malsupren, aŭ flanken. Pro tia aranĝo, aparta direktilo ne estas necesa, ĉar la puŝiloj mem povos direkti la movadon de la ŝipo. La puŝiloj povos turni la ŝipon tute ĉirkaŭen je ĝia propra akso, kvazaŭ sur pivoto, kaj povas ĝin irigi supren aŭ malsupren, ĉu rekte, ĉu oblikve.

Ĉar la klingoj de la puŝiloj estas returneblaj, oni povos malantaŭen irigi la ŝipon per simpla turno de la manradiko, rekte ĉe la maŝinaro, nek haltigante la gasmaŝinon nek ĝin returnante. La puŝiloj havas ĉe la finoj turnrapidon po 480 fojoj ĉiuminute, kaj, helpate de la flankaj puŝiloj, povos movi la ŝipon po pli ol 160 kilometroj ĉiuhore.

La flankaj puŝiloj, proksimume metron kaj duonon larĝaj, estas simile alligitaj per flekseblaj ŝaftoj, kiuj ebligas ke oni metu ilin horizontalaj aŭ vertikalaj. Metite horizontalaj, ili levos aŭ mallevos la



ŝipon; metite vertikalaj, ili ĝin irigos antaŭen aŭ malantaŭen, laŭ la pozicio de la ŝipo.

La gasmaŝinoj mem estas unikaj: ĉiu havas tri cilindrojn, kaj, mirinde, tiuj cilindroj estas alligitaj al unu ŝafto kaj estas turnataj kun ĝi, sed en kontraŭa direkto, kvazaŭ homo penus sin levi per la laĉoj de siaj propraj botoj! Kutime oni metas cilindrojn sur forta kaj firma fundamento: sed tiuj ĉi maŝinoj povas stari sur tabulo dika nur du centimetrojn, kaj, ĉiam rapide turniĝante, restos firme dum monatoj.

La planko de la ŝipo estas konstruita el bambuaj trunkoj, fortaj kaj malpezaj, tial tute konvenaj por tia uzado.

Kvankam oni konstruas la ŝipon precipe por provado, tamen ĝi povos porti kvardek pasaĝerojn. Ĝi estos finita en julio, kaj tiam faros sian unuan flugon. Ĉu

ĝi flugos? Ĉiutage miloj da homoj vizitas la ŝipkonstruejon, kaj la intereso kaj scivolo estas grandaj.

Kun la puŝiloj turnitaj horizontale, la ankroj forjetitaj, kaj gasmaŝinoj funkciantaj, la ŝipo espereble iros supren ĝis la dezirita alteco, tiam, kun vertikale turnitaj puŝiloj, ĝi flugos kiel birdo super la supraĵoj de la plej altaj montoj al sia definitiva celo en malproksima urbo! Se ĝi renkontos ventegon! Tiam ĝi ree turnos la puŝilojn horizontale kaj supren leviĝos super la nuboj kaj la tumulto de la aera batalo, ĝis paca kaj kvieta flugejo en pli supra atmosfera loko, daŭrigante sian antaŭeniradon same kiel birdo kies lertaj flugiloj ŝajne tute malatentas la malpacajn elementojn malsupre.

"Ĝis la flugo!"

G. C. Gearn.

### THE FIRST INTERNATIONAL RACES CONGRESS

The program of this congress has now been issued, and, from the material contained, it is evident that the congress will not only be intensely interesting, but exceedingly important. From the opening session (July 26), until the eighth session every paper will be worthy of the most serious consideration, if we may judge by the titles and the names of those presenting them. It is interesting to note that the first suggestion for such a congress came from an American university, being made five years ago by Prof. Adler, of Columbia University. The congress has now reached realization, and eminent representatives of governments, of universities, of international societies, etc., will be present from practically every race and country. Fundamental considerations, general and special problems of the conditions of progress, friendly contact between civilizations, special economic problems, and suggestions for the develop-

ment of interracial amity, are among the general topics under which the papers and addresses are arranged. It would be hard to find a nation of any color whatever, which will not be ably represented by some speaker, in addition to the many noted speakers upon general interracial matters.

Esperantists will note with gratification that the subject of *International Language* is to be presented at this congress by no less a personage than Dr. Zamenhof himself (whose address will be given at the session on July 29).

All esperantists who can attend this meeting are urged to do so, and to communicate promptly with the general secretary of the congress, Mr. G. Spiller, 63 South Hill Park, Hampstead, London, from whom may be obtained full information regarding membership in the congress, etc.

OKAZINTAĴO ĈE LA SESA. "Mi tute ne ŝatis la paroladon de Sro. F—," diris Jones al sia amiko, kiam ili eliris el la granda kunvenejo.

"Kial ne?" mire demandis la alia, "mi trovis ĝin bonega."

"Ne, mi ne ŝatis ĝin, ĉar mi jam antaŭe legis ĉiujn liajn vortojn el iu libro."

"Ĉu vere! Kiu libro?"

"La Kabe vortaro."

LEHMAN WENDELL.

## BOOK REVIEWS

---

**Poliglota Vade Mecum de Internacia Farmacio**, Celestin Rousseau. 288 pages. Bound in cloth; \$2.00, postpaid.

This international Pharmacopeia is in nine languages; namely, Esperanto, English, French, German, Spanish, Dutch, Italian, Swedish and Latin. It contains general information about weights and measures, etc., of various countries of Europe, America and Japan, followed by a series of comparative tables for formulae in various pharmacopeias, of preparations frequently called for, and a professional vocabulary, so arranged that it can easily be used by a person who is familiar with any one of the nine languages above mentioned. The language Esperanto is given prominence in the title and elsewhere, because the existence of Esperanto is the fact which enabled the production of this work, in which pharmacists of eight nationalities necessarily co-operated. The book is another admirable proof of the practical stage to which the international language Esperanto has arrived, and should be in the hands of every progressive pharmacist for this reason, as well as for its intrinsic value from a professional point of view.

---

**Sufero** (Carmen Sylva). Original German version, with translations into Esperanto and from Esperanto into English, French, Spanish, Italian, Polish and Rumanian, bound in one volume. 102 pages. 30 cents, postpaid.

Permission to make the Esperanto translation and others from it was given by the author Queen Elizabeth of Roumania, in response to the request made by Dr. Robin of Bucharest, editor of "Danubo," and one of the collaborators of AMERIKA ESPERANTISTO. The Esperanto translation (from which translation has been made into eighteen national languages) was made by Dr. Lederer, editor of "Universo," also collaborator of AMERIKA ESPERANTISTO. It is interesting to note that Esperanto has therefore been the medium for bringing this graceful allegory to the attention of so many diverse nations.

**Taglibro de l' Barono Hans von Grote-will**, Notoj pri la Internacia Ekspozicio por Vojaĝo kaj Turismo. Laŭ la germana teksto de Fedor Freund, esperantlingve prilaboris Arnold Behrendt. 32 pages. 15 cents, postpaid.

The official Esperanto booklet of the international exposition described elsewhere in our columns.

---

**Kluĉ Esperanta**. The Esperanto key, in Croatian. Published by the Association of Esperantists in Bosnia-Hercegovina. 2 cents.

This key in Croatian is the latest of the convenient little "tabloid" dictionaries, light enough to be enclosed in a letter without causing the payment of additional postage, so that by writing a letter in Esperanto to a foreigner, and enclosing an Esperanto key in the language of the recipient of the letter, one may be certain that his communication will be understood, for the "key" serves its purpose well. Such keys are now available (at two cents each) in the following languages: French, German, Italian, Rumanian, Spanish, Portuguese, Bohemian, Polish, Hungarian, Russian, Croatian, Dutch, Welch, Catalanian, Swedish, Dano-Norwegian, Finnish and English (English keys in lots of 25 or more, for propaganda use, at one cent each).

---

**Du Rakontoj** (A. Ĉeĥov). Tradukis B. Ketzin, 30 pages; 10 cents, postpaid.

Two short stories, translated from the Russian. Both are of the gloomy nature which is often called a characteristic of Slavic literature.

---

**Esperanta Gvidlibro tra Bosnio kaj Hercegovino**, published by the Association of Esperantists in Bosnia-Hercegovina. Illustrated. 34 pages. 15 cents, postpaid.

This guidebook of a region which until comparatively recent years has been rather inaccessible to the tourist is unusually interesting, and the pictures which illustrate it are well chosen. The reader will feel a lively desire to visit this land where Orient and Occident meet, and where Esperanto is receiving a cordial welcome.



The eleventh International Esperanto Congress should in held in San Francisco, Cal., the Exposition City of 1915.

Gesamideanoj—Buy one. If each one who reads this ad will send me an order for the "1915 Exposition Emblem Transfer Picture," I go to the Seventh International Congress, if you don't I don't go.

Will you Buy? By so doing you will help our "Kara Lingvo," for when I return from Europe I will have a great many facts about Esperanto, consequently I will be able to carry on a successful propaganda. Especially so on the Pacific Coast—It needs it. Help me to help the "Kara Lingvo," and Esperantize San Francisco.

## READ AND TAKE NOTICE.

THE 1915 EXPOSITION EMBLEM IS THE CRAZE OF THE DAY.

This beautiful art creation will transfer on anything. It is a pastime and a pleasure for anyone to transfer the most beautiful of all pictures. Any child can do it. Transfers on silk or skins, for sofa pillows, or on your windows or doors. They are most effective, representing beautiful stained glass. Make one on cardboard for a calendar that has no equal for beauty; for plaques as wall decorations they add charm to any room, and as a picture to frame it has no equal, as it is in twelve colors and a correct representation from the original painting by Mr. Charles A. de Lisle-Holland, one of the world's most famous artists. The original painting is valued at \$10,000, and was executed expressly for the Panama-Pacific International Exposition, San Francisco, California, 1915. This master artist is the only artist who makes a specialty of Exposition paintings. To lovers of art it is only necessary to mention a few titles of Mr. de Lisle-Holland's creations; as "Trilby," "Zaza," "Stella," "Nana," "Martyrs of the Main," "Beauty and the Beast," his indescribable conception of "Iagara" of the Pan-American Exposition, his divine creation, the "Power of Love," of the St. Louis Exposition, are only excelled by his masterpiece, the great allegorical painting entitled, "Panama-Pacific." All of Mr. Holland's greatest paintings have been reproduced from the originals, and are treasured in the homes and galleries of the lovers of art the world over. You who possess a reproduction of one of Mr. Holland's enchanting conceptions are fortunate, indeed. Write today, don't delay, for PANAMA-PACIFIC, last but not least, this entrancing creation produced by the inspired brush of this great genius is the picture of the day. Have one for your home or office. Art lovers will not be without it.

## Description of the 1915 Exposition Emblem Transfer Picture.

Reproduced in Twelve Colors Direct from the Original Painting, Entitled

### "PANAMA-PACIFIC."

Size of picture, ten inches in diameter and thirty inches in circumference, with three beautiful and graceful figures representing, allegorically, Panama-Pacific International Exposition, San Francisco, California, 1915.


The middle figure is "Panama" in her national color, with outstretched arms, holding in one hand the ship, and the globe in the other, presenting Commerce to the world. To her left, gracefully posed and draped in crimson, is the figure representing "Atlantic and Manufacturing," "Liberty" enlightening the world by the torch upheld with her right hand. The figure to the right is "Pacific," draped in royal purple, holding in her lap the Horn of Plenty, portraying the vast abundance of the undeveloped agricultural interests of this modern

### "LAND OF CANAAN."

The three figures, being partly nude, symbolizes the Semi-Tropical Zone of the Pacific Coast, with the beautiful sunset of California, so often seen upon the shores of the Pacific as pictured in the background of the conception.

Last, but not least, the trio gracefully posing on the Rock of Foundation, representing the substantial opportunities of the Pacific.

The 1915 Exposition Emblem Transfer Picture, with description and Canal statistics, cost \$1.00 each. Send money orders and checks to R. E. BLACKSTONE, Esperantisto, 310 Jefferson Square Bldg., San Francisco, California.



# Emerson Pianoj

Koncertaj kaj Rektaj

FONDITA 1849

La piano por la artisto kaj la hejmo. Unu grado—unu kvalito. La plej bona kiun nia deziro kaj sperto permesas. "Emerson, Boston," aperas en la metala afiŝeto sur ĉiu piano farita de ni.

*Vendata je prezo kiu reprezentas la veran valoron.*

**100,000** Emerson Pianoj estas uzataj de la muzikama publiko tra la mondo

Al ĉiu interesa esperantisto **NI VOLONTE SENDOS EKZEMPLE-  
RON DE NIA KATALOGO**, kiu montras per ilustraĵoj la historion de la fortepiano. Petu la katalogon per karto esperante skribita.

**EMERSON PIANO CO.**

*Boston (560 Harrison Ave.) Usono*

## Oficiala Gazeto Esperantista

Organo de la Lingva Komitato  
De la Konstanta Komitato de la Kongresoj  
Kaj de la Internacia Konsilantaro

**Jara Abono: 5 Frankoj**

**Unu Numero: 50 Centimoj**

Redakcio kaj Administracio:  
**51, RUE DE CLICHY, PARIS**

### EL LA DECIDARO DE LA SESA KONGRESO:

LA SESA KONGRESO MEMORIGAS AL ĈIUJ SOCIETOJ KAJ GRUPOJ, KE LA ABONO AL LA OFICIALA GAZETO ESTAS UNU EL LA PLEJ BONAJ RIMEDOJ POR HELPI FINANCE LA OFICIALAJN INSTITUCIOJN DE ESPERANTO, KAJ POR ESTI REGULE INFORMATA PRI ILIAJ LABOROJ.



Por helpi la esperantistan propagandon en du landoj de Orienta Eŭropo  
abonu la revuon

## DANUBO

Monata organo de la Rumanaj kaj Bulgaraj Esperantistoj.  
INTERNACIA GAZETO NUR EN ESPERANTO

Redaktata de speciala komitato kun la kunlaborado de eminentaj diverslandaj  
Esperantistoj.

Enhavas: abundan kvanton de plej Internacia kaj zorge elektata Literaturo; interesajn "Miksaĵoj;" apartan multpaĝan rubrikon "Krestomatio por Infanoj kaj Komencantoj;" artikolojn pri Esperanto kaj Esperantismo; zorge elektatan "Esperantista Movado;" "Diversaĵoj," ktp., ktp.

Redakcio & Administracio:

5, Str. I. C. Bratianu, Bukureŝt'o (Rumanujo)

Jara Abono: 1.40 Sm. (70c.)

Specimena numero nur kontraŭ respondkupono.

Oni abonas ankaŭ ĉe American Esperantist Co., Washington, D. C., Usono.

## SKRIBMAŜINO "BLICKENSDEFER"

### PEZAS

5

8

Aŭ

10

### FUNTOJN



### KOSTAS

40

50

Aŭ

60

### DOLAROJN

La Blickensderfer estas speciale operatuna por Esperantistoj:—ĉar la tipradoj estas facile kaj rapide intersangeblaj, kio permesas la uzadon de diversaj specoj kaj lingvoj (Estas pli ol 140 malsamaj tipradoj) sur unu maŝino. Oni surmetas inkon de rulilo, ne uzante rubandon. Skribaĵo videbla. Perfekta kaj daŭra rektlinieco de skribado. Facila por funkcigi, kaj tre malpeza por porti. Unu el ĝiaj bonaj ecoj estas grandega fortoco kaj daŭreco. Ĝi portas aŭ la Blickensderfer klavaron, aŭ la Universalan Klavaron.

Modelo 8 havas ĉiujn el la plej novaj plibonigoj, inklusive de postenmovilo kaj dekopa tabellilo.

Estos je via profito esplori, antaŭ ol aĉeti alian maŝinon.

Petu Katalogon A 32, kiu priskribas la diversajn modelojn.

The Blickensderfer Mfg. Co., Executive Office and Factory, Stamford, Conn., Usono.

The Blickensderfer is specially adapted to the use of Esperantists:—because the typewheels are easily and quickly interchangeable—permitting the use of different styles and languages (there are over 140 different wheels) on the same machine. The inking is from a roll—no ribbon used. Writing in sight. Perfect and Permanent alignment. Easy to operate and very portable. One of its prominent features is great Strength and Durability. Either Blickensderfer Scientific or Universal Keyboard.

Model 8 has all the latest features, including Back Spacer and Decimal Tabulator.

It will be to your advantage to investigate before purchasing any other.

Send for catalogue A 32, describing the different models.

## POŝTMARKOJ

Kolekti poŝtmarkojn estas la plej granda plezuro.

Komencu hodiaŭ!

500 veraj fremdaj poŝtmarkoj 12c (Sm. 0.24). 100 diversaj poŝtmarkoj el Hispanujo, Kubo, Ĉilo, Japanujo, k. t. p. 5c (Sm. 0.10).

Mi deziras aĉeti pogranda poŝtmarkojn de ĉiuj landoj. Sendu al mi priskribon kaj prezon de tiuj, klujn vi havas. Skribu al mi por prezoj de ĉiaj poŝtmarkoj.

G. E. Nickles, 122 Florida Ave., Wash., D. C.

## Printing ???

### ESPERANTO or ENGLISH

Have your work done by the first and best Esperanto printer in America.

Clearly accented type. Skilled workmen. Modern machinery.

Prices low. Workmanship careful. Material good.

Letterheads for Esperanto societies and officers.

ERNEST F. DOW, W. Newton Sta., Boston, Mass.

# KORESPONDADO.

Publikigu ĉi tie vian nomon por havigi korespondantojn en ĉiu parte de la mondo. **P** signifas ke oni volas ricevi nur poŝtkartojn ilustritajn; **L** signifas nur leterojn. Al donu laŭvole la temon, pri kiu vi volas korespondi; tion, kion vi deziras interŝanĝi, k. t. p.

La kosto estas por unu anonco po 20 cendoj (40 Sd.), por kvarfoja anonco po 50 cendoj (1 Sm), por ĉiu linio. Estas en linio proksimume 53 literoj, punktoj aŭ spacoj.

## USONO.

**P** Sro. John C. Vasselín, Blossberg, Tioga Co., Pa.

Sro. H. M. Torrey, City Carrier 12, Flint, Mich.

Sro. Clifford J. Laube, Rico, Colo.

## PORTUGALO.

Sro. Heliodoro de Sousa, Seminário de Funckal, Madeira, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj precipe poŝtmarkojn.

## RUMANUJO.

**P** Sro. Alexandru Panaitescu, Str. Grigore Alexandrescu, 88, Bukaresto (ankau pmarkojn).

Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto

## „LA ONDO DE ESPERANTO“

(laŭ la adreso: 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.).

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tiu ĉi

sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 16-paĝaj numeroj, la librojn:

1) A. Rivier. En Rusujo per Esperanto. (130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo.)

2) V. Devjatnin. Plena Verkaro. 3-a Vol. 140-paĝa libro.

PUBLISHED AUGUST 25, 1910

## A Complete Grammar of Esperanto

By Ivy Kellerman, A. M., Ph. D., chairman of examinations for the Esperanto Association of North America, member of the International LINGVA KOMITATO. Cloth XIV—334 pages. Retail post-paid \$1.25.

### A Complete Grammar and Reader in One Book

A circular recently sent out by the British Esperanto Association says: "Dr. Kellerman's Grammar of Esperanto is the first book on the subject, which compares in scholarship at all favourably with the Grammars existing for other Languages. The appearance of such a serious work should, therefore, mark a distinct gain in the recognition which is being accorded the movement for Esperanto by scholarly and commercial worlds. . . . The Kellerman Grammar has the following general advantages: **First:** It contains correct and clear explanations of all grammatical points. **Second:** Word formation is fully treated and syntax is given due consideration. **Third:** Grammatical topics are presented in an order of gradually increasing difficulty, instead of in haphazard fashion. **Fourth:** The reading matter for each lesson illustrates grammatical points, also reviewing preceding lessons, and the vocabularies of both. **Fifth:** New topics are consistently illustrated by the use of words or roots already familiar from previous lessons. The reading exercises, from the eighth lesson, form coherent narratives, each complete in itself, and usually a story of genuine interest. The material for these stories has been worked out with much care. **Sixth:** Although the book surpasses previous text-books in all the above features, and contains much more of interest and value than any other available book, the total number of pages is only slightly more than in the earlier Esperanto books. This economy of space is due to conciseness in explanation, avoidance of repetition and to the classification of material, which enables the briefest possible explanation."

**D. C. HEATH & COMPANY**

NEW YORK

BOSTON

CHICAGO

For Sale By American Esperantist Co., Washington, D. C.